

Esperantista Primavera en Jekaterinburg, 01-a – 04-a de majo 2008. Entute la renkontiĝon partoprenis 74 personoj el 25 loĝlokoj de 3 landoj: 72 el **Rusio**: Jekaterinburg – 19, Tjumenj – 13, Ĉeljabinsk – 7, Miass (Ĉeljabinska reg.) – 7, Niĵnij Tagil (Sverdlovska reg.) – 3, Volgograd – 3, Krasnojarsk – 2, Moskvo – 2, Omsk – 2, Ĥanti-Mansijsk (Tjumena reg.), Ijevsk, Irkutsk, Iŝim (Tjumena reg.), Jelec, Kamensk-Uraljskij (Sverdlovska reg.), Klimovsk (Moskva reg.), Novosibirsk, Novoutkinsk (Sverdlovska reg.), Permĵ, Rostov-na-Donu, Surgut (Tjumena reg.), Tiĥvin (Leningrada reg.), Uljanovsk – po 1; kaj po 1 el **Pollando** kaj **Kazaĥio**. Inter la partoprenantoj estis 31 viroj kaj 43 virinoj. Junularon ĝis 30 jaroj konsistigis 21 personoj, el kiuj estis 4 infanoj. La plej aĝa partoprenanto (B.Ĉupin) aĝas 74 jarojn, la plej juna (F.Vŝivcev) – 5 jarojn. La plej granda E-staĝo estas 50 jaroj (S.Kotljarov). Laŭ la E-staĝo la esperantistoj disdividiĝis jene: malpli ol 1 jaro – 7 personoj, de 1 ĝis 5 jaroj – 7, de 5 ĝis 10 jaroj – 9, de 10 ĝis 20 jaroj – 7, de 20 ĝis 30 jaroj – 28, de 30 ĝis 40 jaroj – 9, pli ol 40 jaroj – 4.

EsPrimo-5 atakis kaj kolorigis freŝverde la grizan mondon, kaj tuj post ĝi revenis al Uralo printempo. Ne plu pluvo kun neĝo, nur varmo kaj suno. Kaj en naturo, kaj en la animoj. La renkontiĝo estis sukcesa. Plensukcesa. Kvina, jubilea, ĝi superis ĉiujn miajn atendojn kaj ĉiujn antaŭajn EsPrimojn – kaj kvante, kaj kvalite. Mi eĉ kuraĝus supozi, ke apenaŭ ĉi-jare en Rusio okazos pli granda kaj signifa E-renkontiĝo. Kunveniginte 74 geamikojn el 25 lokoj de tri landoj kaj kunfandinte Eŭropon kaj Azion – de Bielsko-Biala ĝis Irkutsk, de Rostov-na-Donu ĝis Surgut, ĝi kvazaŭ anstataŭis la neokazontan RET. Partoprenantoj el Moskvo, Tiĥvin, Volgograd, Jelec, Uljanovsk, Omsk, Krasnojarsk – ĉu vere ĉi EsPrimo estis nur regiona renkontiĝo aŭ jam fakte landskala?

Por mi ĝi estis kvazaŭ RET, mallonga RET, kaj etose, kaj konsiste. Okazis tiel, ke EsPrimoj ludis aparte gravan rolon en mia vivo – la unua partoprenita, “Esperantista Printempo en Uralo”, aŭ EsPrimo-2, “revivigis” kaj revenigis min al Esperantujo. En la kvina mi jam estis kune kun Raja kaj Viktoro Kudrjavcev, Arina Osipova, Saŝa Osincev (Jekaterinburg) kaj Paŝa Veselov (Tjumenj) en la organiza teamo, kiu senripoze kaj sendorme klopodis por ĝia sukcesigo. Apartan inspiron donis al EsPrimo veno de niaj foraj gastoj, inter kiuj estis plej karaj amikoj – Mikaelo Bronŝtejn, Georgo Handzlik, Garik Kokolija, Aleksandro Melnikov. Ili tutkore reeĥis al nia



duma la inaŭgura vespero

voko kaj vere ornamis la aranĝon per siaj elstaraj kontribuoj.

EsPrimo venis kaj plenigis la renkontiĝejon per prelegoj, koncertoj, amika kvivito, kantoj, ridoj. La programo estis ekstreme streĉa, ĉiuj kvar tagoj estis plenŝtopitaj – junularaj programeroj, kiujn mi, ve, eĉ ne sukcesis partopreni, ofte okazadis paralele kun la ĉefa fluo, alie simple ne eblus plenumi ĉion! Ĝojigas, ke la tuta renkontiĝo pasis nur en Esperanto. Matenoj komenciĝadis de nepraj lecionoj por komencantoj gvide de Saŝa kaj Arina, kaj samtempe al ŝpertuloj Mikaelo Bronŝtejn jen majstre instruis tradukarton, jen sprite rakontis-kantis pri sia riĉa vojaĝsperto.

Seriozaj prelegoj kaj sinprezentadoj de niaj VIP-gastoj, kiuj meritas apartan priskribon, alternis kun klerigaj kaj ripozigaj aranĝoj. Mi ĉiam miras, kiom originalajn programerojn sukcesas preparadi por EsPrimoj nia regiona VIP, lingva

URALA VALSO

Salutas nin suna veter',
Salutas nin freŝa aer',
Ĉar pelis la vintron al hasta forkur'
Gastama Jekaterinburg'.

Ref: Ura-Ura-Uralo!
Valsigu kune nin.
En la printempa balo –
Donaco de l' destin'.
Ura-Ura-Uralo!
Alvenis nia temp'.
Dum ĝojo kaj dum malo
Ni restu en printemp'!

Ni ludu kun sprita sagac',
Ni kantu kaj dancu sen lac',
La sentojn esprimu sen tim'
kaj sen lim',
Dum nia bonkora EsPrim'.

Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin)

ŝpertegulo Vladimir Opletajev el Surgut. Es-Primanoj vere bonŝancas plezure lerni ion de li! Kiom da inspiro kaj fantazio montris ĉiuj partoprenintoj de la praktikumo pri E-paroletiketo, improvizante en skeĉoj lingvajn situaciojn kaj konkurante pri retoriko! Kaj multaj jam tuj plezure ekaplikis la ricevatajn sciojn post la aranĝo. En lia lingva kaj societa ludo “Intelektula kazino” la tuta salono entuziasme konkurencis pri E-scioj. Estas aparta majstreco instrui pri la lingvo, ĝia historio kaj movado en tia maltrude distra formo! La kazonon sekvis gvidata de Garik aŭkcio, en kiu ĉiu partoprenanto povis elspezi ĵus gajnitajn en la ludo poentojn – “saĝojn” por lotumataj libroj kaj esperantaĵoj.

Nepre grava parto de la renkontiĝo estis Ronda Tablo pri la regiona agado, kie sonis jarraportoj pri aktivado en la regionaj kluboj, pri instruado, interreta informado kaj komunikado, estis resumita sperto de kvin agadjaroj ekde la unua EsPrimo en Toboljsk kaj diskutitaj multaj seriozaj problemoj. Fine la

regiona kunveno akceptis inviton de Katerina Arbekova gastigi sekvajare EsPrimon-6 en Novosibirsk.

Ne mankis al ni ankaŭ distraj programeroj. Refoje unu el perloj de la renkontiĝo estis la gvidata de Raja “Bluf-klubo”, montranta, ke niaj sprituloj neniom cedas al siaj TV-kolegoj. Belis la tradiciaj Amika kaj Gaja Vesperoj, preparitaj de la jekaterinburga junulara klubo “Arĝenta flamo” kun aktiva partopreno de ĉiuj Es-Primanoj. Okazis libroservo kaj multaj ekspozicioj.

Ĉi-foje aparte brila estis la koncerta programo – ravis ĉiujn unuafoje kantanta por ural-siberia amikaro Georgo Handzlik, kaj refoje donacis siajn ĝuindajn kantojn, kiujn mi pretas aŭskulti senfine kaj senĉese, Brunŝtono. Ĉarme hejme estis

Adiaŭa Vespero kun kortuŝa komuna koncerto – ĉiu ŝatis EsPrimi siajn sentojn: prezentis ĵus naskitan kanton pri ĉi vojaĝo Georgo, belege kantis Evelina Sokolova (Krasnojarsk), debutis en EsPrimo Tolik Krasnokutskij (Moskvo), prezentis siajn versaĵojn Tatjana Vŝivceva (Miass), Veniamin Rozenberg (Omsk), Nikolaj Neĉajev (Irkutsk), sonis multaj varmaj vortoj, eĉ de plej freŝaj komencantoj. Finalakorde-adiaŭe kantigis ĉiujn Nikolaj Terentjev (Ĉeljabinsk).

Kaj certe en mia memoro restos ravaj noktoj, aparte la lasta, kiam, sidante en varma rondo, mi ĝuis proksimecon de miaj amikoj, sentis, ke neniuj distancoj povas disigi nin, ensorbis ridetojn, rigardojn, vortojn, kunkantis niajn orajn kantojn kun Garik kaj Evelina kaj aŭskultis admire, kiel elkore kanzonas, foje eĉ krokodile, ĉiam amoplana Mikaelo kaj ĉarme lirika Georgo. Neforgeseble!

Galina Terentjeva (Ĉeljabinsk)

VIP – VERE INTERESAJ PERSONOJ EN JEKATERINBURG

Vizitonte uralajn esperantistajn renkontiĝojn oni jam kutimiĝis scivole studi iliajn antaŭprogramojn por trovi tie ne nur interesajn kaj utilajn programojn, sed ankaŭ nomojn de personoj, kiuj volonte venas ĉi tien por sin prezenti al la publiko, prelegi, kunesti en la amika medio, interŝanĝi spertojn.

Ankaŭ ĉi-foje la gastigantoj de EsPrimo-5 sukcesis inviti elstarajn homojn, kies multifaceta talento estis nemalgrava argumento por frandemuloj de la Esperanta kulturo, ke ili nepre vizitu maje Jekaterinburgon. Eĉ plie, la organiza teamo vastigis la vicon de Vere Interesaj Personoj (VIP) ĝis eksterlandaj limoj.

La unuan de aprilo, ekzakte unu monaton antaŭ la aspirata starto de la forumo, en la Ural-Siberia paĝaro <<http://www.ural-sib.org/eo/>> subite aperis provoka retaliĝo de iu certa Ludoviko Zamenhof el Bjalistoko. Por pluraj hezitemuloj tio iĝis kaj surprizo konforma al la tago de humuro kaj samtempe aliĝakcela sprono, ĉar la kreaĵo de la Majstro estas la bela vivanta lingvo, kiun ne eblas plene ĝui nur sidante hejme en iu fora urbeto kaj legante retmesaĝojn. Do pli ol sep dekoj da esperantistoj kunvenis en la urala ĉefurbo por ĝui la ĉeeston de personoj, kies kontribuo al la nuntempa E-kulturo estas eminenta kaj nekontestebla.

Profesoro Aleksandr Melnikov (Rostov-na-Donu) – ĵusa partopreninto de la grandformata lingvistika konferenco en Ĉeljabinsk, kie li prelegis pri Esperanto, – raportis pri interesaj sciencaj faktoj kaj siaj propraj spertoj sur lingvistika kampo, verve pledante por Esperanto kiel plej praktika kaj demokratia solvo de lingvaj problemoj. Ĉiujn impresis lia impeta kaj instiga maniero kontakti la aŭskultantojn, samkiel liaj trafaj vortludoj kaj spritaj eldiroj. Legu nur, kiel nekutime sed punktotrafe sonis la titolo de lia prelego antaŭ la partoprenantoj de EsPrimo-5: “Kiel bovido



Vladimir Opletajev



Aleksandr Melnikov

kverkon kornbatis, aŭ La Moskvo-2007-a konferenco pri la propedeŭtika valoro de Eo: faktoj kaj impresoj inter burokrataj karesoj”. Antaŭ ol urĝe forveturi el Jekaterinburg sekvantage, Aleksandr Sergejeviĉ denove kolektis plenan saloneton de dezirantoj akumuli neordinarajn spertojn el lia senfunda instru-metodika trezorujo.

Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin) volonte renkontiĝas kun rusiaj legantoj de sia esperantlingva verkaro. Dum la uralaj paroladoj, kiuj neeviteble transformiĝis je dialogoj, li majstre tenis atenton de la plurdeka aŭskultantaro kaj rikoltis meritajn aplaŭdojn.

Li havas en la literaturo ŝatatajn temojn, al kiuj ĉi-foje estis dediĉita lia metiejo: tradukarto, Puŝkin, Brodskij, fratoj Strugackij. La aŭtora vespera koncerto prezentis al ĉiuj Brunŝtonon fidelan al Esperanto kaj al sia Muzo – bardon inteligentan, tolereman, atentan, lertan plenumanton, kapablan emocie konkuri la publikon per siaj melodioj kaj tekstoj. Mikaelo Bronŝtejn estas konata ankaŭ kiel senlaca prelegvojaĝanto, por kiu interŝtataj limoj estas nur surmapaj simboloj, kaj ili ne malhelpas lin senĝene kontakti homojn eksterlande, pri kio li sugestis proprajn abundajn spertojn en la brila raporto “Akceptu mondo min amike, aŭ sperto vojaĝi en Esperantujo”.

Georgo Handzlik, gasto el Pollando (Bielsko-Biala), kuraĝiĝis veni al Jekaterinburg por proprapaŝe transiri ĉi tie la limon inter Eŭropo kaj Azio kaj ekvidi iomete la Okcidentan Siberion. Sed krom historiaj kaj naturaj vidindaĵoj li trovis ĉi tie multajn geamikojn, kaj oni volonte aŭskultis lian agrablan mildtembran voĉon, kiam li rakontis historion de sia esperantistiĝo kaj raportis pri la lingva situacio en Eŭropo aŭ konigis siajn ampleksajn kaj tre variajn profesiajn agadkampojn. Al legantoj de la revuo “Komencanto” Georgo konfesis, ke ĉion li ŝuldas al Esperanto, sed ankaŭ Esperanto ŝuldas al li amon kaj admiron, kiujn ĉiuj aŭskultantoj povis senti en liaj kantoj dum la aŭtora koncerto de “la bardo sen

barbo”. Pli ol dekon da revuoj kun sia portreto surkovrilpaĝe li devis fine subskribi por memoro al uralaj esperantistoj.

Garik Kokolija (Moskvo) povis partopreni nur parton de la programo de la renkontiĝo, sed lia apero inter esperantistoj kaj entuziasmaj kontribuoj al



partoprenantoj de la “Bluf-klubo”

la ĝenerala etoso estis vere agrablaj kaj dezirataj elementoj. Apenaŭ unu horo sufiĉis al li por renkontiĝi kun scivolaj legantoj de REGo kaj respondi plurajn demandojn. La vivo montras al homoj ĉiam novajn logajn kaj tentajn vojojn, sed la vojo de Esperanto restas por Garik unu el la ĉefaj en lia vivo.

Firdaus Kasimov (Permj) prezentis al la publiko siajn rezonojn pri la historio de malfacilaj, foje eĉ tragediaj rilatoj inter la Kazana ĥanejo kaj la moskvaj caroj. La temo montriĝis al la ĉeestantoj interesa, cetere ĝi estis la sola prelegeto, kiu ne rilatis lingvajn problemojn, kaj pluraj vigle partoprenis historiajn diskutojn kaj dankis al Firdaus por lia sukcesa oratora debuto en EsPrimo.

Tre rapide forflugis la agrablaj majaj tagoj en Jekaterinburgo, sed en la memoro restas vizaĝoj, voĉoj, karakteroj, ridetoj de homoj, kiuj markis la specialan neripeteblan atmosferon de EsPrimo-5 per siaj ideoj, opinioj, konoj, kapabloj. Oni denove havis ŝancon renkontiĝi kun vere interesaj kaj inteligentaj homoj, ĉiam bonvenaj en la rondo de esperantistoj.

Vladimir Opletajev (Surgut)

“... RESTIS NUR EN LA MEMORO BELAJ TAGOJ DE PRINTEMPO”

Miaj emocioj kaj impresoj apenaŭ transdoneblas per vortoj – por mi tio estis simple anima festo! Ŝajnas, ke ni kunestis en tute aparta spaco, aero, tempo; ke ni ĝoje kaj plezure vivis sur iu insulo de bonkoreco, amo kaj amikeco. Ĉirkaŭ ni ŝvebis Printempo, plenigante ĉion per renoviĝo kaj belo. Ĝi ebligis senti sin pli junaj, pli *verdantaj*, pli inspiritaj. Kaj Printempo instigis nin al aktiveco.

Mi tre ĝojis, rimarkante, ke la kreita etoso vekis ĉe multaj deziron iel kree esprimi sin: verki poemon kaj legi ĝin, donaci al ĉiuj ĵusnaskitan kanton aŭ kolektiĝi grupe kaj kune ion prezenti. Tre valoras, ke ĝenerale krom la planitaj kaj preparitaj programoj estis multaj improvizaĵoj, kiuj naskiĝis dum la renkontiĝo kaj respegulis entuziasmiĝon kaj malfermiĝon de la partoprenintoj.

Mi certas, ke por la gejunuloj nia renkontiĝo estis bona ebleco sperti la E-parolantan komunumon en ĝia diverseco: ebleco aŭdi bonajn oratorojn, aŭdi, kiel bele kaj flue oni povas paroli en Esperanto, kaj samtempe konvinkiĝi, ke Esperanto taŭgas por ĉiaspecaj komunikadoj: por ordinara babilado, por poezio, por kunludoj ktp. Multaj eroj de la programo, kiuj konsistigis ĝian kernon, estis vere bongustaj lingvaj frandaĵoj! Espereble, iuj el la novbakitaj esperantistoj ricevis bezonatan antaŭenpuŝon kaj motivadon por perfektigi.



Raja Kudrjavceva dum EsPrimo ne ripozis, ŝajne, eĉ unu minuton, konstante pri io zorgante



adiaŭa Amika Rondo

Mi esperas, ke por miaj samklubanoj, membroj de E-klubo “Arĝenta flamo”, kiuj ĉiuj estas junaĝaj (kaj nur mi inter ili junanima), preparado de tiu ĉi renkontiĝo estis bona hardanta tasko, ĝi donis iun valoran sperton, kiu helpas al ili estonte jam memstare organizi similajn renkontiĝojn.

Ni, ĉiuj partoprenintoj, travivis bonan tempon en tiuj kvar majaj tagoj, sed ajna festo ne povas

daŭri eterne kaj havas sian finon.

Mi kredas, ke la impresoj kaj emocioj, kiujn ni ricevis, ne estas pormomentaj, ili longe ne forviŝiĝos en la memoroj kaj donos siajn rezultojn, kaj ĉio reeĥos multe pli vaste poste...

Raja Kudrjavceva (Jekaterinburg)

VERSAJ IMPRESOJ

Ĉu tio gravas, aĥ, gesinjoroj,
 Ĉu tio gravas?
 Ke nia bela kvina EsPrimo
 Vere min ravas:
 Ravaj ge-Dioj gloron promesas
 Por la kunveno,
 L’ organizantoj la kamomilon
 Ŝiras kun peno.
 Ravas min homoj – la geamikoj –
 Ĉiu jam fora:
 Melnikov saltas dum leciono
 (La profesoro!),
 Osincev traktas inojn ĝentile
 Eĉ ideale.
 Mia team’ ja montras: amikoj,
 Agu vi male!
 Aro respondas al la demandoj –
 Tiras kartetojn
 Kaj aŭkcias, vendas la saĝojn
 Kontraŭ objektoj...

Fermu l’ okulojn – ĝuu diversajn
 Sonojn fabelajn:
 Sonoriletoj de Opletajev
 Tintas tre bele;
 Sonas la kantoj de Mikaelo
 (Post la kantado
 Voĉ’ Mikaela sperte instruas
 Pri tradukado);
 Sonas babiloj blufaj kaj veraj:
 Tre interesaj –
 Raja denove blufas kun viroj –
 Ravaj impresoj!
 Voĉo de Handzlik, per la gitaro
 Akompanata,
 Sonas pri lingvoj, pri frivolaĵoj
 Kaj simple kantas...
 Ravas min svagaj
 voĉoj,
 vizaĝoj,
 kantoj,

babiloj,
Kaj strigumado,
kaj palpebrum' de
projekciilo,
gaja vesper',
regionaj diskutoj...

Tempo forkuras.
Rondo amika.
Dankon al ĉiuj.
Mi forveturas...

Tatjana Vŝivceva (Miass)

ORGANIZANTA KONKLUDO

Nun, kiam “EsPrimo-5” estas jam efektivigita aranĝo, ni, la organizantoj, analizas la okazigitan – fine, kiu analizu la faritan de ni, se ne ni mem?

Nin ĝojigis la sukceso krei vere printempan, bonhumoran, festan etoson dum la renkontiĝo. Nun, kiam ni trarigardas per komputilo centojn da fotoj, faritaj de la partoprenintoj, ni vidas sur ili nur ĝojajn, ridemajn kaj ridetantajn vizaĝojn. Kaj tio tre kontentigas nin, la organizantojn. Ja dum ni scipovas ŝerci, ridi, ludi, ni – ĉiuj sendepende de la aĝo – estas junaj! Sed kiel ĉiam malantaŭ gajaj kaj ridigaj momentoj sin kaŝis niaj seriozaj intencoj: unuigi ĉiujn, spertulojn kaj novulojn, E-grupojn kaj E-unuopulojn el diversaj urboj; malpliigi la homan *inertecon* kaj mallaborem, entuziasmiĝi, interesigi pri la movado; riĉigi per prilingvaj kaj prikulturaj scioj, pri amikoj, pri pozitivaj emocioj kaj sentoj.

Tiuj tagoj sukcesis kunigi ĝojan energion de multaj interesaj personoj, kiuj senavare kontribuis por la sukceso de la aranĝo: de la gasto el Pollando Georgo Handzlik, de d-ro el Rostov-Don Aleksandr Melnikov, de nia amata verkisto, poeto kaj bardo Mikaelo Bronŝtejn, de la animo de la E-komunumo Garik Kokolija, de talenta kaj inspiranta instruisto Volodja Opletajev, de la ĉarmaj kantemaj duopoj: Galja kaj Nikolaj Terentjev, Evelina Sokolova kaj Rustam Karapetjan, de la reaperinta urala kantisto Aleksej Fomin, de la fidela EsPrimanino Katja Arbekova, de niaj uralaj Esperanto-gemoj: Tatjana Vŝivceva, Aleksandr Kalaŝnikov, Firdaus Kasimov, Pavel Veselov kaj de multaj, multaj aliaj. Apud ili mi simple sentis firon, ke en nia Esperantujo ekzistas tiuj personoj. Mi dankas ilin ĉiujn, ke ili estis kune kun ni, plibeligis nian renkontiĝon!

Mi esperas, ke por ĉiuj partoprenintoj tio estis tagoj intense, utile, plezure travivitaj, kaj ili plenigis nin per freŝaj fortoj, donis emocian kaj intelektan ŝargon por multaj monatoj antaŭen.

Viktor Kudrjavcev (Jekaterinburg)



Viktor Kudrjavcev ĉiam pretas ŝerci, kvankam ankaŭ li estis supersutita per zorgoj

OSMO BULLER EN MOSKVO

Osmo Buller, la Ĝenerala Direktoro de UEA, venis al Moskvo sabate, la 17-an de majo. La celo de tiu ĉi vizito estis konatiĝi kun Moskvo, kiu kandidatiĝis por okazigo de la Universala Kongreso de Esperanto en 2010.

Dimanĉe Osmo Buller, akompanate de Gennadij Miĥajloviĉ Ŝilo kaj mi, ekskursis al Troice-Sergijeva Lavra. Estis bela tago, la oraj kupoloj brilegis, ekzotiko abundis. Posttagmeze okazis ŝipekskurso laŭ la rivero Moskvo – same dum bela vetero kaj kun multe da vidindaĵoj.

Lunde matene Osmo Buller prelegis al studentoj de la universitato “Justo” pri UEA. Oni multe demandis (en Esperanto, kvankam kun eraroj, sed oni ja ne longe studis la lingvon). La etoso estis agrabla, sentiĝis sincera intereso al la temo.

Tagmeze okazis vizito al Centra Muzika Lernejo, kies direktoro i.a. rakontis pri la manieroj atingi ion grandan en Rusio (sur la ekzemplo, kiel li sukcesis ricevi fi-

nancadon por la lernejo).

Okazis tagmanĝo kaj konatiĝo kun la ejoj de la Lernejo. Ĝi situas sufiĉe centre de Moskvo, je distanco de unu kilometro de Kremlo.

Poste ni vizitis eventualajn kongresejojn: la sport-palacon “Olimpijskij” kaj la kongrescentron “Kosmos”. “Olimpijskij” kun ĝiaj 35 mil lokoj tamen ŝajnis iom tro granda.

Vespere okazis renkontiĝo de Osmo Buller kun moskvaj es-



ĉe la Ruĝa Placo

perantistoj en la E-klubo “Lev Tolstoj”.

Marde la 20-an estis la konkluda tago de la konatiĝa vizito de Osmo Buller al Rusio. Matene li promenis en la Ruĝa Placo, okupita ĉi-foje per “futbala urbeto” kun pokalo de Ĉampion-Ligo de UEFA – kaj vicego por viziti ĝin, eĉ pli longa ol tiu por viziti la maŭzoleon de Lenin. Pro la vicoj estis decidite iri nek tien, nek tien. Tamen kompanse tuj apud la Ruĝa Placo ni renkontis “vivan Lenin” – la E-parolantan imitanton de Lenin – Anatolij Koklenkov. Anatolij rakontis pri sia laboro, kantis Internacion en Esperanto kaj fotiĝis apud la Ĝenerala Direktoro de UEA. Poste okazis mallonga ekskurso al Parko de Venko.

Je la 14.30 Osmo Buller, prof. Ŝilo, prof. Komkov, Svetlana Smetanina (kiel reprezentanto de Moskva EK “Lev Tolstoj”) kaj mi (kiel REU-representanto) estis akceptitaj de moskvaj oficialuloj. Ĉeestis A.V.Petrov (vicurbestro), reprezentanto de internacia fako de la urbestrejo kaj vicestro de kleriga fako de la urbestrejo. Post

konatiĝo kaj enkondukaj vortoj Osmo Buller rakontis pri UEA, Universalaj Kongresoj kaj atendoj de UEA pri eventuala kongresado en Moskvo. Responde A.Petrov konfirmis inviton nome de la urbestro Luĵkov, ke UEA venu kongresi en 2010 al Moskvo. Je ĉiuj antaŭpreparitaj demandoj li plenkonfide respondis, ke tio estas facile solvebla kaj



dum la renkontiĝo kun moskvaj oficialuloj

ne estas problemo. Pri la preparado de la teknikaj kondiĉoj de la invito estis komisiite zorgi al la kleriga fako. La kunsido entute daŭris unu kaj duonan horon.

Vespere la urbestro aranĝis vespermanĝon por Osmo Buller en la restoracio “Villa Rosa”. Flanke de la urbestro ĉeestis vicprefekto de la Centra Arondismento G.Borjatinskaja kaj respondeca oficisto de la internacia fako K.Petrov. Flanke de esperantistoj ĉeestis la samaj, kiel dum la taga kunsido. La vespermanĝo pasis, kiel oni diras en protokoloj, “en varma kaj amikeca etoso”. Iam fine la oficistoj jam tute senĝene rakontis pri la specifajoj de moskva burokrata maŝino kaj ĵuris ellerni Esperanton. Kaj lanĉi la instruadon de la lingvo en ĉiuj lernejoj de Moskvo.

La vizito finiĝis merkrede, la 21-an, kiam O.Buller forflugis al Nederlando el la moskva flughaveno “Ŝeremetjevo”.

Andrej Grigorjevskij (Ŝumerlja)

KIAL – LA NOVA FESTIVALO?

En la belega sunplena dimanĉa tago, la 13-an de aprilo, en la centro de la ĉefurbo, fakte – vi ne kredos – preskaŭ en la korto de la Dumao pasis la 1-a Moskva internacia festivalo “Amata urbo”, lanĉita kaj organizita de la Moskva junulara Esperanto-klubo “EK MASI”. Sendube, ĝi estas nova evento, kvankam bazita sur la tre konata forma modelo de la famaj Lingvaj festivaloj (LF).

Skize ni rememoru la strukturan skemon. La Malfermo – kun la anoncoj de la prezentotaj urboj (da tiuj estis 25) kaj koncertaj artaĵoj – komenciĝis je la 13-a kaj daŭris horon. Sekvis la baza parto: ses 30-minutaj blokoj de



paralelaj prezentadoj, kun 10-minutaj paŭzoj. Entute estis prezentitaj 25 urboj (preskaŭ ĉiuj – pli ol unufoje), kiel ekzemple – Bukareŝto, Ĉeboksari, Dnepropetrovsk, Dublino, Erevano, Jerusalemo, Kuala-Lumpuro, Kioto, Manamo, Minsko, Tbiliso, Suzdalj k.a. Dum la mallonga Fermo estis solena enmanigo de la diplomoj al la prezentantoj, artistoj kaj organizantoj, post kio oni spektis filmon pri antikva civilizo. Ĉion kronis la festeneto por la kontribuintoj.

La Festivalon afable akceptis la lernejo № 179 – absolute perfektaejo por la aranĝo de tiu skalo, kiu disponigis al ni ĉion bezonatan – de akta halo kaj klasĉambroj ĝis diversspeca aparataro kaj teujoj. En la lernejaj koridoroj estis lokitaj fotoekspozicioj de diversaj aŭtoroj pri diversaj urboj. Dum la tuta tago funkciis “Instruista teejo” kaj lerneja bufedo por gastoj, ankaŭ laejo kun ĉinaj teceremonioj. La festivalon vizitis ĉirkaŭ 200 personoj, inkluzive ĵurnalistojn, kies pozitivaj raportoj poste aperies en kelkaj amaskomunikiloj.

Kutima afero, ĉu ne? Kial do nia klubo decidis organizi ĝin?



La nova festivalo estas por ni ne nur memstara evento, sed ankaŭ rimedo allogi atenton de pli da homoj al la esperantista agado unuflanke kaj al la estontaj niaj LF aliflanke. Ni opinias, ke LF, tamen, allogas sufiĉe specifan tavolon de moskva junularo – tiujn, kiuj interesiĝas pri lingvoj. La temo “urbo” ŝajnas al ni pli vasta kaj pli varia. Estas interese, ke tiu temo okazis pli suk-

cesa de internacia vidpunkto: la festivalon partoprenis kiel urboprezentantoj pli da eksterlandanoj, ol venadis por prezenti lingvojn dum du niaj pasintaj LF. Krome, ni aktive bonvenigis al la festivalo aliajn similtajn projektojn. Ĉi-foje inter la prezentantoj estis la rolludantoj kun la temo “Luda urbo”. Al la urba temo volonte reagis la Rumania ambasadejo, kiu okazigis en la disponigita por ili klaso grandiozan ambasadan akcepton, veran feston kun naciaj ekspozicioj, filmoj, vin-regalado kaj donacoj. Ĉio tio estas nur la unuaj paŝoj – kiuj malfermas novajn kaj novajn perspektivojn...

Skeptikuloj diras: kiun utilon la festivalo donos por Esperanto? La plej grava estas: multaj kaj multaj homoj unuan fojon ekaŭdis pri ekzisto de Esperanto, Esperanto-movado, ĝiaj celoj kaj idealoj. La plej aktivaj el ili iĝis niaj kunlaborantoj kaj amikoj, fakte – veraj *samideanoj*. Ĉu tio ne konformas al la celoj de la E-movado?

Konservativuloj diras: LF – nu, certe – ja Esperanto estas lingvo. Sed kial – urboj? Ne nia temo! Eble, iu ankoraŭ memoras, ke tute ne tuj esperantistoj akceptis la

ideon de LF: kial ni devas disipi fortojn por propagandi aliajn lingvojn?

Meditemuloj diras: la temo “urboj” malpli konkretas kaj imponas, ol “lingvoj”. Sed – la Festivalo ja estas planata ĝuste kiel malpli granda aranĝo, kvazaŭ interna, mezjara inter



LF – kaj ni ne planas ĝin pligrandigi, kvankam vidas ĝin tradicia. Sama inter-LF-a aranĝo estis ĉe ni la akcio okaze de la Eŭropa tago de lingvoj en la pasintjara septembro.

Kritikemuloj diras: de organiza vidpunkto vi preskaŭ fiaskis, enhave kaj forme multaj prezentoj estis subnivelaĵoj. Ho, jes! La vero. Pro la malfrua veno de la publiko prokrastiĝis la malfermo kaj la tagordo grave fuŝiĝis. Strebante al la homa internacieco, al la kvanto kaj diverseco de la urba paletro, ni foje “fermis la okulojn” pri la kvalito de la prezentadoj. Sed – dum la ardaĵ postfestaj analizadoj kaj diskutoj ni faris niajn konkludojn! Kaj – kia lernado! Por la prezentantoj mem kaj por la novaj teamanoj, kiuj laboris tre entuziasme kaj tute ne emas halti! Kaj – se pesi ĉiujn plusojn kaj minusojn – la Festivalo sendube gajnis!

La 2-a festivalo “Amata urbo” okazos en aprilo 2009. Ĉiuj estas kore bonvenaj – kiel urboprezentantoj aŭ gastoj! La paĝaroj de la festivalo estas: <http://lingvafestivalo.info/gorod/>.

Ni invitas ĉiujn ankaŭ al la 3-a Moskva internacia lingva festivalo, kiu okazos la 26-an de oktobro 2008 en la Instituto de fremdaj lingvoj de la Moskva urba pedagogia universitato. La eksterlandanoj ricevos oficialajn invitilojn de la Universitato, se mendas ilin antaŭ la 28-a de aŭgusto. La paĝaro de LF estas <http://lingvafestivalo.info/moskvo/>.

Bonvenon al la partopreno kaj kunlaboro!

Irina Gončarova, kunordiganto de “EK MASI”, direktoro de la festivaloj

TRAJNO “ZAMENHOF”

Dank’ al la afabla helpo de la Direkcio de la Regiona Trajna Kampanio en Bjalistoko, laŭ la propono de la Urbestro de Bjalistoko, kun la financa subteno de la Marŝalo de la Podlaĥia Vojevodio en la somera horaro ekestos la trajno “Zamenhof”.

La 1-an de junio 2008 ĝi la unuan fojon startos longan vojon de Bjalistoko al Bielsko-Biała. Sur la kajo, apud la trajno, je la 06.05 okazos solena “bapto”; kaj

poste la adiaŭo de la trajno kun Ludoviko kaj Klara Zamenhof, kiuj kuraccele forvojaĝos “al akvoj”.

Survoje ĉe la Centra Stacidomo de Varsovio kaj en Katowice salutos la Familion Zamenhof esperantistoj atendantaj sur kajoj. Surloke, en Bielsko-Biała, gesinjoroj Zamenhof renkontiĝos kun la honora komitato, kiu sub la gvido de eŭro-deputitino Margerita Handzlik atendos ilian alvenon. Posttagmeze ĉiuj partoprenos la feston okaze de Internacia Tago de Infano, reklamos Esperanton kaj la naskiĝurbon de Ludoviko Zamenhof. Pri laŭepokaj vestaĵoj por la Familio Zamenhof zorgos la Dramteatro en Bjalistoko. En la trajno estos disdonitaj flugfolioj pri Esperanto kaj Bjalistoko. Per la trajna mikrofono Ludoviko rakontos al vojaĝantoj pri la ideo kaj la lingvo universala. La evento okazos sub la media protekto de la TV Bialystok kaj la televidkanalo TVN.

Ĉiuj, kiuj dezirus kunorganizi la festan vojaĝon de la trajno, estos bonvenaj. Kontakto nin uzante la retadreson <esperanto.bialystok@interia.pl>.

“Leviĝanta Bjalistoko” – jen la slogano, per kiu dum la 4 venontaj jaroj estos promociata la ĉefa urbo de Podlaĥio. Laŭ la mendo de la urbestro Tadeo Truskolaski la firmao “Grupo Eskadra”, kiu okupiĝas pri la promocio de urboj, prilaboris la strategion de la promocio de Bjalistoko. “Temas ĉefe pri tio, ke ni deziras montri Bjalistokon kiel urbon vivantan, dinamikan, modernan kaj substrekantan sian ekziston, kulturon kaj tradicion”, – diris la vicurbestro pri kulturo Tadeo Arlukoviĉ. La strategio baziĝas sur la multkultureco de Bjalistoko. “Grupo Eskadra” vidas ege grandajn ŝancojn por la promocio pere de Esperanto. Aldona argumento estas la fakto, ke en la jaro 2009, ĝuste en la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof, estas organizota la 94-a UK.

Ela Karczewska (Pollando)

AL VVS

La 14-an de aprilo en la moskva E-klubo “Lev Tolstoj” okazis festado de la 50-jara datreveno de la esperantiĝo de Vladimir Vladimiroviĉ Samodaj. Al tiu jubileo estas dediĉita ankaŭ la suba versaĵo.

Aĥ, mia kara Samodaj,
La senkompara Samodaj!
Dum kvindek jaroj vi diboĉas
Sub nia verda stelo, kaj
Rezulte de la diboĉad’, –
Amiko, kamarado, frat’, –
Al la estonto poezia
Tre multajn gvidis via pad’.

Memoras vin en cima rol’
Nur grizkapuloj, sed parol’
Pri l’ SEJM-akuŝaj aventuroj
Cirkulas plu en la popol’.



Ho, sveltis vi, kiel fraksen',
Sed iom malsolide sen
Aŭtoritato elstaranta
Antaŭen kvazaŭ mol-kusen'.

Do dum vagado en la mond',
Trans nia verda horizont',
Fidinde planis kaj prizorgis
Vi ĉion ĉi por la estont',
Kaj, reveninte por eksku'
De l' uloj en "Anba Mosku",
Per esperantaj suplementoj
Aperis en legaĵ-vaku'.

Verŝajne, dum prezida dorm'
Vin kaptis poezi-ador',
Kaj eleganta poemaro
Naskiĝis tuj en via kor'.
Poet' samkiel malpoet'
En via moskva ekgazet'
Azilon trovis kontraŭ spleno
Dum la tutlanda kvodlibet'.

Sed nun scienco kaj kultur'
Rideton vian portas sur
La kovrilpaĝoj, kaj lipharoj
Kontente pretas al murmur'.
Kaj kun spirita arta ben'
Navigas lerte vi, balen',
Tra l' ocean' de l' verda vivo –
Foje kun mono, foje – sen.



Do, mia kara Samodaj,
Neniam knara Samodaj,
Plu vivu vi en deca farto,
Kaj estu sana sen malgaj'.
Sed mi en ĉirkaŭanta ĥor'
Dankegu la destinon por
La amikeco, donacita
Al reciproka bonhumor'.

Mikaelo Bronštejn

Bulteno de REU

DATREVENA SIMPOZIO TRAKTIS LINGVAJN RAJTOJN

La 24-an de aprilo okazis en la Ĝeneva sidejo de Unuiĝintaj Nacioj simpozio pri lingvaj homaj rajtoj, dediĉita al la 100-jariĝo de Universala Esperanto-Asocio kaj la 60-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Unuafoje simila simpozio okazis antaŭ 10 jaroj lige kun la 90-a datreveno de UEA kaj la 50-a de la Deklaracio. Memorigante pri la iama traktado pri Esperanto ĉe Ligo de Nacioj en la sama loko, Palaco de Nacioj, Prezidanto de UEA, prof. Probal Dasgupta atentigis: “En ĉi tiu loko Francio iam metis sian vetoon kontraŭ Esperanto. Eble Privat nun kontentus pri ni.”

Bondezirojn por la simpozio sendis la ĝenerala direktoro de la Ĝeneva Oficejo de UN, s-ro Sergio A. Orĝonikdze. Li gratulis UEA pro ĝia jubileo kaj menciis i.a.: “UEA faras signifan kontribuon al la antaŭenigo de lingvaj rajtoj en la mondo, precipe pere de sia aktivado subtene al la rajto uzi kaj esti edukata en sia propra gepatra lingvo.” La estro de la Oficejo de UN por ligoj kun NRO-oj, s-ro Ricardo Espinosa, mem ĉeestis kaj salutparolis. Mesaĝon de la prezidanto de CONGO (komunumo de NRO-j en oficialaj rilatoj kun UN), s-ro Liberato Bautista, peris la unua vicprezidanto de CONGO, s-ino Anna Biondi. La antaŭa prezidanto de CONGO, s-ino Renate Bloem, kunprezidis la matenan sesion. Nome de Svisa Esperanto-Societo salutis ĝia kunprezidanto Didi Weidmann, kiu elstarigis la rolon de la svisa Esperanto-movado kiel akuŝinto de la jubileanta UEA.

Fine de la malferma solenaĵo prezidanto Dasgupta, krom saluti en la nomo de UEA, samtempe faris prezenton pri substancaj lingvaj rajtoj.

En la programo estis pluraj prelegoj de eminentaj specialistoj. D-ino Tove Skutnabb-Kangas (Universitato de Roskilde, Danlando) prelegis pri “Lingvo, edukado kaj (rompo de) homaj rajtoj”. Ŝi aparte emfazis la lingvan rajton de infanoj ricevi edukon en sia gepatra lingvo, kaj la genocidajn situaciojn, kiuj ekzistas, kiam oni praktike devigas la infanojn de difinita popolo transiri al alia lingvo. La temo de prof. François Grin (Universitato de Ĝenevo) estis “Interkompreniĝo kiel strategio por lingva justeco”.

Li pritraktis modelon, pri kiu li nun laboras, por utiligi la interkompreneblecon inter samgrupaj lingvoj en Eŭropo por malpliigi la traduk-kvanton kaj samtempe garantii al ĉiu servon en lingvo, kiun li/ŝi povas facile kompreni. Kunlaboranto de Grin, d-ro Michele Gazzola prelegis pri “Instruado en universitatoj: la lingvaj gajnoj kaj malgajnoj pro internaciismo”. Li traktis la malpozitivajn sekvojn de la troigita bezono instrui en la angla en eŭropaj universitatoj kaj de la diskriminacioj kontraŭ esploristoj, kiuj ne verkas en la angla. Kiel reprezentantoj de indiĝenaj popoloj en Kolombio, Alasko kaj Ĉilio, pri ties situacio parolis respektive John

Mateo Lopez, ambasadoro Ronald Barnes kaj Flor Rayen Calfunao Paillalef.

En la simpozio partoprenis ĉ. 70 homoj el 13 landoj. Proksimume duono estis neesperantistoj el diversaj NRO-j. Rimarkinda estis la ĉeesto de klaso de gejunuloj el svisa mezlernejo, sub la gvido de sia instruistino Mireille Grosjean.

Jam antaŭ la simpozio ekfunkciis ĝia retpaĝaro <www.linguistic-rights.org>. La paĝaro estos plu evoluigata por fariĝi atentopunkto por ĉiuj, kies lingvaj rajtoj estas malobservataj, kaj por ke oni ĝenerale ekkonsciu, ke Esperanto estas rimedo por defendi lingvaj rajtojn. Financan subtenon por la aranĝo UEA ricevis de Svisa Esperanto-Societo kaj de Instituto Hodler '68.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

MALFERMA TAGO EN JUBILEA ETOSO

La 28-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA la 26-an de aprilo estis markita de la 100-a datreveno de la fonda de Universala Esperanto-Asocio. Diference de la jarfina Malferma Tago, kiu ĉiujare okazas en la lasta sabato de novembro, la “printempa” ne havas fiksan daton, sed ĉi-foje ĝi nature estis aranĝita en la sabato plej proksima al la fondotago de UEA, la 28-a de aprilo. Entute 125 vizitantoj el 19 landoj plenigis la UEA-domon. Inter ili estis ankaŭ ĉiuj estraranoj de UEA, kiuj tuj post la Malferma Tago havis 3-tagan kunsidon.

Oni aŭskultis du prelegantojn. La Prezidanto de UEA, prof. Probal Dasgupta titolis sian prelegon “Historio por malfermi la estontecon”, omaĝe al la simbola signifo por nia kulturo de la samtitola ĉina-japana-korea komuna verko pri la konflikta historio de la regiono. Li alvokis al la lanĉo de Esperanta Pedagogio por la 2-a jarcento de UEA, taŭge utiligante la bonŝance hibridan karakteron de Esperanto en la nuna historia momento de la homa socio. D-ro Ziko van Dijk faris dupartan prelegon pri “UEA tra la tempoj” ordigante sian riĉan materialon per sinsekvo de ĉapitroj kaj demandoj pri la klopodoj konstrui mondskan tegmenton por la Esperanto-movado. Li emfazis la konstantan zorgadon pri la “plusvaloro” de UEA, nome la internaciaj kongresoj kaj reprezentado de la esperantistaro antaŭ internaciaj instancoj, portado de Esperanto en landojn kie ĝi ne ĉeestas, ktp.

Plene konkeris la publikon Nanne Kalma kaj Ankie van der Meer el la kantogrupo “Kajto”, kiuj donis du unuhorajn koncertojn. La programeron “TEJO sin prezentas” prizorgis Gregor Hinker, prezidanto de la junulara sekcio de UEA, kun la TEJO-volontulino Julia Noe. Aldone al la tradicia senpaga loterio TEJO aranĝis skriban kvizon, kies respondojn oni devis serĉi dise tra la domo. Okazis prezentoj de novaj eldonaĵoj por veki apetiton por butikumado en la libroservo, kiu funkciigis ankaŭ la tradician bazon de esperantaĵoj en la sekretaria ĉambro de CO. La pinta titolo de la tago, kun 21 venditaj ekzempleroj, estis la freŝe aperinta “Ksenofobia gvidlibro al la nederlandanoj”, sekvata de la libro de Heidi Goes pri la historio de Esperanto en Afriko, “Afero de espero”, kiu vendiĝis en 16 ekzempleroj. Popularaj estis krome la adresaro de Pasporta Servo (9 ekz.), la ampleksa versio de “Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj” (6 ekz.), la araba proverbaro “La trezoro” (6 ekz.) kaj la islanda mitologia verko “La Edda” (5 ekz.). La vendoj de libroj k.a. varoj sumiĝis entute je 3135,87 eŭroj.

En la vespero la Estraro de UEA invitis la stabon de la Centra Oficejo, kelkajn eksoficistojn kaj aliajn gastojn al jubilea bankedo. Kiel honora gasto partoprenis sino Birthe Lapenna. La sekva Malferma Tago okazos la 29-an de novembro.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

LA ESTRARO KUNSIDIS LABOREGE

La Estraro de UEA, elektita en la Jokohama UK, kunsidis en la Centra Oficejo de la 27-a ĝis la 29-a de aprilo. Temis pri la unua efektiva laborkunsido de la Estraro, kiu en Jokohamo povis trakti nur kelkajn urĝajn aferojn kaj decidi pri sia interna taskodivido. La Estraro tamen ne atendis ĝis aprilo, sed vigle eklaboris per retaj diskutoj tuj post UK kaj faris dum la pasintaj monatoj 22 decidojn. Krom la sep estraranoj, en la aprila kunsido ĉeestis, parte aŭ tuttempe, la Ĝenerala Direktoro, la redaktoro de “Esperanto”, Konstanta Kongresa Sekretario kaj observantoj de TEJO kaj de ILEI, respektive Gregor Hinker kaj Zsafia Korody. La estraranoj kaj aliaj ĉeestantoj vere laboregis: sen kalkuli kaf- kaj manĝpaŭzojn ili kunsidis preskaŭ 30 horojn kaj finis sian laboron en la tria tago nur iom antaŭ la noktomezo.

Grandan parton de la tempo prenis preparoj por la kunsidoj de la Komitato en la ĉi-jara UK. Oni aprobis agadraporton pri la jaro 2007, kiu aperos en la junia numero de “Esperanto” kaj dum kies traktado en UK ankaŭ la publiko rajtos interveni. Por la dua sinsekva jaro la el- kaj enspezoj de la Asocio estis praktike en ekvilibro. La buĝeto antaŭvidis minusan saldon de 5000 eŭroj, sed la fina minuso estas nur ĉ. 1300 eŭroj, kiu en spezokonto de preskaŭ 450 000 eŭroj estas neglekta. Same kiel la buĝeto por la nuna jaro, ankaŭ tiu por 2009 estas plene ekvilibra malgraŭ enkalkulita dungo de plia oficisto. La Estraro tamen konscias, ke por konservi tiun bonan staton necesos daŭra aktiveco sur la financa kampo. Pro tio la financa estrarano Loes Demmendaal prezentis planon pri enspezigaj agadoj, kiun la Estraro baldaŭ definitivigos.

La Estraro decidis ankaŭ pri honorigoj, diplomoj kaj premioj, publikigotaj dum UK, kaj nomumis 52 ĉefdelegitojn por la trijara periodo 2008-2010. Oni konfirmis la konsiston de la Loka Kongresa Komitato de la 94-a UK en Bjalistoko (25 julio – 1 aŭgusto 2009) kun vicurbestro Aleksander Sosna kiel ĝia prezidanto. Pri la loko de UK en 2010 oni decidis dum la Roterdama UK. Prepare por tio la Ĝenerala Direktoro jam vizitis Havanon kaj estis vizitonta Moskvon en majo. Al la eldona serio “Oriento-Okcidento” estis akceptita nova titolo, la klasika ĉina majstroverko “Romano pri Tri Regno”. La 24-a okazigo de la Esperanto-aranĝo ARKONES en Poznano (19-21 septembro 2008) ricevis aŭspiciojn de UEA.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

SALUTON, “TEJO AKTUALE”!

“TEJO aktuale” (TA) estas reta novaĵletero de TEJO. Ĝi malaperis dum la pasintaj monatoj, sed nun ni ŝatus ĝin revivigi. Per TA ni ĉiujn 2 semajnojn koncize raportas pri novaĵoj el nia asocio: renkontiĝoj, konkursoj, publikaĵoj.

Ĉu vi ŝatus esti informita pri tio, kio okazas en la E-mondo, sed ne volas aboni 20 dissendlistojn? Por vi estas TA! Por aboni TA simple iru al

<<http://www.tejo.org/tejo-aktuale/>>.

Jen estas kelkaj freŝaj informoj el TA:

Dum la pasinta Internacio Seminario en Würzburg, Germanio, estis la elekto de la nova estraro de TEJO. Pliaj informojn pri la nuna estraro vi povas trovi en la retpaĝo: <<http://www.tejo.org/estraro/>>.

En la jaro 2007 TEJO havis 394 individuajn kaj 3888 aligitajn membrojn.

La Bamba, nokta vivo, amuziĝo sed ankaŭ kunsidoj, prelegoj, trejnadaj kaj laborgrupoj – ĉio okazas dum unu vigla semajno, spertinda por ĉiu juna esperantisto! La IJK estas la plej granda junulara Esperanto-aranĝo kaj okazos ĉiujare en alia lando organizita de niaj landaj sekcioj kaj lokaj aktivuloj kunlabore kun TEJO. La sekva IJK okazos en Szombathely de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 2008 (tuj post UK en Rotterdamo). Pliajn informojn vidu en la retpaĝo: <<http://www.tejo.org/ijk/>>.

La estraro de TEJO decidis ke plezuranta taskon de organizado de IJK en 2009 havas la Ĉeĥa Esperanto-Junularo, kune kun Germana kaj Pola Esperanto-Junularoj, kaj la kongreso okazos en la urbo Liberec, Ĉeĥio.

Projekto Gutenberg estas usona iniciato, kiu disponigas tute senpage librojn por elŝutado en pluraj lingvoj. Unu el la lingvoj disponeblaj estas Esperanto. Musklaku la ligilon kaj aliru al 126 libroj en Esperanto por senpage elŝutado: <<http://www.gutenberg.org/browse/languages/eo>>.

(tejo-aktuale)

NEKUTIME ABUNDA IKU EN ROTTERDAMO

D-ro Wim Jansen, docento pri interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo, gvidos la Internacian Kongresan Universitaton dum la Rotterdama UK. La Estraro de UEA nomumis lin rektoro de IKU en sia aprila kunsido, en kiu ĝi ankaŭ elektis la prelegantojn. La Estraro sekvis plene la proponon de la Komisiono pri IKU, al kiu ĉi-jare anoncis sin eksterordinare granda nombro da kandidatoj. Estis entute 22 proponoj, el kiuj plejmulto tre altnivela, pro kio la tasko de la Komisiono ne estis facila.

La Estraro akceptis ties rekomendon, ke ĉi-jare estu 11 prelegoj anstataŭ la kutima nombro 9. Malgraŭ la pli granda nombro kelkaj valoraj proponoj devis esti ellasitaj.

En Rotterdamo oni aŭskultos jenajn prelegojn:

- Probal Dasgupta (Hinda Unio): “Popola kaj malpopola posedo de la lingva riĉo”;
- Geoffrey Greatrex (Kanado): “Prokopio de Cezareo, enigma historiisto de la epoko de Justiniano”;
- Maritza Gutiérrez (Kubo): “Kuba metodo de alfabetigo”;
- Mauro La Torre (Italio): “Kiel savi lingvo-variecon per interlingva edukado?”;
- Hans Michael Maitzen (Aŭstrio): “De la centro de la universo ĝis la spacoŝipo Tero: kiaj konsekvencoj por tuthomara etiko?”;
- Jukka Pietiläinen (Finnlando): “Publika opinio pri la utilaj lingvoj en Eŭ-

ropo”;

– Baldur Ragnarsson (Islando): “Verki poezion en Esperanto”;

– Orlando E. Raola (Usono): “Neŭtrona difrakto: aplikoj al esplorado de nanomaterialoj”;

– Keyhan Sayadpour (Irano): “Denaskaj Kormalsanoj”;

– John Wells (Britio): “La mirinda mondo de sonoj”;

– Bengt-Arne Wickström (Germanio): “Ekonomiko kaj lingvo”.

La prelegoj de Maitzen, Wells kaj Wickström samtempe enkondukos kurson de Akademio Internacia de la Sciencoj. Ĉiu AIS-kurso konsistos el la koncerna IKU-prelego kaj du daŭrigaj lekcioj, kio ebligas al la partoprenantoj pli profunde konatiĝi kun la temo.

(Gazetaraj Komunikoj de UEA)

NOVAJ REU-MEMBROJ POR 2008

INDIVIDUAJ MEMBROJ

Alimov Artjom (Krasnodar), Arbekova Katerina

(Novosibirsk), Gadirova Diljara (Toboljsk),

Glaznica Tatjana (Ĉeljabinsk), Jefimenko Miĥail

(Krasnodar), Jeroŝejeva Lidija (Niĝnij Tagil),

Kalaŝnikov Aleksandr (Tjumenj), Kotljarov

Stanislav (Sverdlovsk reg.), Lenskaja Galina (Moskva reg.), Novikova Ljudmila

(Moskvo), Ŝĉotkin Vladimir (Dimitrovgrad), Zaharova Valentina (Usinsk)

REU dankas pro la mondonaco (300 rub.) al Artjom Alimov (Krasnodar).

FAMILIAJ MEMBROJ

Glaznica Natalja (Ĉeljabinsk) – kandidato, Taran Aleksandra (Krasnodar)

ALIGITAJ MEMBROJ

Esperanto-klubo “Verda fajreto” de la urbo Ĉusovoj (Perma regiono) (10 membroj), la listo: *Detkovskaja Natalja, Djakova Tatjana, Karklinj Olĝa, Permionova Julija, Pjatiĝina Svetlana, Potaŝev Dmitrij, Ribolovleva Larisa, Sidorova Nadeĝda, Ŝiriukina Darja, Volnuĥina Jekaterina*

Jekaterinburga EK “Argenta flamo” (5 membroj): *Brezgin Oleg, Godireva Svetlana, Osincev Aleksandr, Osipova Arina, Zamislova Jekaterina*

Moskva E-klubo “EK MASI” (+15 membroj): *Akimov Oleg, Baŝlikova Anastasija, Beljaĝeva Jekaterina, Gamaleja Anna, Gergeŝan Jevĝenij, Gergeŝan Roman, Jeŝtkova Aleksandra, Kanarskaja Tatjana, Kanarskij Ivan, Miĥajlenko Svetlana, Ovĉinnikov Miĥail, Semjonova Natalja, Ŝirov Andrej, Solovjova Olĝa, Ŝumilo Nikolaj*

Tjumenaj Esperanto-klubo “Revo” (+2 membroj): *Morozova Galina, Voloĝanin Andrej*

Plena aktuala listo de la membroj troveblas en la ttt-ejo de REU laŭ la adreso <<http://reu.ru/index.php?dok=membrolisto>>.

KOTIZOJ DE REU/REJM POR 2008

Individua kotizo – 100 rub. (por Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ; por ceteraj landoj – 10 eŭroj), inkluzivas la membrokarton, Jarlibron/Manlibron de REU, REU-bultenon kaj aliajn informojn de REU, voĉdonrajton en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en aranĝoj de REU/REJM.

Dumviva kotizo – 2500 rub. (por Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ; por ceteraj landoj – 250 eŭroj) – ĉio la sama dum la tuta vivo.

Familia kotizo – 35 rub., por familianoj de membro paginta individuan aŭ dumvivan kotizon kaj loĝanta samadrese (la membrokarto, voĉdonrajto en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en aranĝoj de REU/REJM).

Rabatita individua kotizo – nelaborantaj gejunuloj kun la aĝo malpli ol 26 jaroj pagas 50% de la kotizo.

Subtenkotizoj (ĉio sama kiel por individua kotizo): *REU-subtenanto* – duobla individua kotizo; *REJM-patrono* – duobla individua kotizo.

Kolektiva membrokotizo – 35 rub. por ĉiu aligita membro (la aliĝintaj kolektivoj pagas minimume por 5 aligitaj membroj), inkluzivas po 1 ekzemplero de REGo kaj Jarlibro/Manlibro de REU por ĉiu komenciĝinta deko de la aligitaj membroj, aliajn informojn de REU por la kolektivo; la membrokartojn, voĉdonrajtojn en REU-Konferenco, rabatojn ĉe uzo de REU-servoj kaj en aranĝoj de REU/REJM por la aligitaj membroj.

Aliĝkotizo – 200 rub., unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. La jamaj aliĝintaj kolektivoj ne pagas ĝin. La nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se la organizaĵo ne pagas kotizojn por aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi estas konsiderata likvidiĝinta kaj poste devus denove aliĝi.

Rabatita abono de REGo – 200 rub. (ekster Rusio – 15 eŭroj), por ĉiuj membroj. La dumvivaj membroj, kiuj pagis sian kotizon en 2001-2003, plu ricevados REGon sen aldona pago.

Rabatita abono de “Komencanto” – 180 rub. (nur en Rusio), por ĉiuj membroj.

Membri en REU oni rajtas ekde la aĝo 18 jaroj; 14-17-jaruloj rajtas aliĝi kiel kandidatoj.

Ĉiuj membroj de REU kun la aĝo malpli ol 31 jaroj aŭtomate iĝas membroj de la junulara sekcio REJM (Rusia Esperantista Junulara Movado) kaj ricevas voĉdonrajtojn en REJM-voĉdonoj.

Membroj de REU iĝas aligitaj membroj de Universala Esperanto-Asocio, la malpli ol 31-jaraj – ankaŭ de TEJO.

Aliĝilon, rublajn kotizojn kaj rabatitajn abonpagojn por REGo kaj “Komencanto” sendu (poŝtmandate) al: **Чертилову Михаилу Константиновичу, а/я 21, Одинцово-6, 143006 Московская область.** La eŭraj kotizoj pagendas al la konto **reu-a-p** ĉe UEA. (Pri pliaj pagmanieroj informiĝu ĉe Mikaelo Ĉertilov rete <membreco@reu.ru>, telefone +7-916-2019437 aŭ poŝte laŭ la supre indikita adreso.)

Eksciu, ke...

35 LINGVOJ PREZENTITAJ DUM LA DUA LF EN PETERBURGO



35 lingvoj kaj du branĉoj de lingvoscienco estis prezentitaj la 13-an de aprilo kadre de la Dua Lingva Festivalo en Sankt-Peterburg. Proksimume 200 spektantoj venis por partopreni la eventon, inkluzive 37 prezentantojn.

Ĉi-jare, probable la unuan fojon en historio de la lingvofestivala movado, okazis prezentoj de kelkaj minoritataj lingvoj de rusia nordo: la neneca (nena), la tofalara kaj la ĉukĉa. Inter la novaĵoj de la festivalo estis ankaŭ la itala, la belorusa, la kpelea, la finna kaj pluraj aliaj. Notindas veno de gastaj prelegantoj el Moskvo kaj Iĵevsk.

Inter la sep prezentblokoj de la festivalo estis tri prezentoj de Esperanto; unu el ili okazis neantaŭplanite, laŭ la peto de kelkaj partoprenantoj, kiuj volis aŭskulti pri la lingvo, ne trafinte al la antaŭaj ĝiaj prezentoj. Bone reliefigis imagon pri Esperanto ankaŭ la funkciinta la tutan tempon de la festivalo libra servo de Moskva Esperanto-Centro.

Samkiel la pasintan jaron, oficiale la festivalo estas ĉie prezentita kiel komuna aranĝo de REU (kies membroj estis inter la ĉefaj organizantoj) kaj la jura fakultato de Sankt-Peterburga Ŝtata Agrikultura Universitato, kiu gastigis la eventon. La festivalon subtenis la kompanio “Moja Vkusnaja Ĵiznj” per senpaga manĝaĵo por la prezentantoj kaj per organizo de pagata manĝejo por ĉiuj aliaj partoprenantoj.

La fotojn pri la evento eblas vidi ĉe la ttt-ejo <<http://fotki.yandex.ru/users/miŝa/album/35084>> kaj en la socia reto “vKontakte” (necesas registriĝo): <<http://vkontakte.ru/photos.php?act=album&id=19058799>>.

Vjaĉeslav Ivanov (Sankt-Peterbrgo)



La 29-an de marto nia urbo ree salutis ĉiujn, kiuj interesiĝas pri diversaj lingvoj. La tuta pedagogia universitato estis okupita de gelernantoj kaj gestudentoj, de geinstruistoj el urbaj kaj vilaĝaj lernejoj, de ĉiuj, kiuj ŝatas lingvojn aŭ interesiĝas pri kulturo de aliaj landoj, pri diversaj alilandaj tradicioj.

La programo estis bunta. Dum la Festivalo estis prezentitaj 24 lingvoj: angla, araba, armena, “bafusam” (Kamerunio), cigana, ĉina, ĉuvaŝa, franca, germana, hebrea, hispana, itala, mordva, nederlanda, portugala, skota, tatara, turka k.a.

La lingvojn prezentis instruistoj kaj studentoj de la fremdlingva fakultato, anoj de naci-kulturaj societoj (Uljanovsk estas multnacia urbo), eksterlandaj studentoj, apartaj reprezentantoj de kelkaj lingvoj. Oni la unuan fojon eksciis ekzemple pri la lingvo “efik” (Niĝerio). Ĉiuj lingvoj estis prezentitaj po du- aŭ trifoje, krom unu escepto – Esperanto (kvarfoje).

Esperanto-salono estis “la najlo de la programo” laŭ vortoj de unu el ĵurnalistoj, raportintaj pri la Festivalo.

Tio okazis dank’ al aktiva agado de E-klubanoj: Irina Grebeŝĉenko, Sergej Abramov, Jekaterina Ĵuravljova, Olĝa Sjabukova kaj Juriĵ Karcev. Kantojn, ludojn, teatraĵetojn enhavis ilia prezentado.

Ĉi-jare programo de la Festivalo enhavis dancan majstro-klason. Dum 30 minutoj oni povis lerni unu el kvar dancoj: rusan, orientan, mordvan aŭ aŭstran. La aranĝo tre plaĉis al partoprenantoj, ĉar ili povis okupiĝi pri io se ili malfruis al la lingvoprezentado.

Tradicie ĉiuj povis kanti en muzika salono. Ĉi-jare la kantado estis nekutima. Kun Vasilij Januŝevskij, studento de la fremdlingva fakultato, la vizitantoj de salono kantis en diversaj lingvoj: ekzemple ni kantis “Se vi ne ekzistus plu” ruse, france kaj Esperante. Kaj tre plaĉis al ĉiuj la kanto “Abio”, kiu estis kantita angle, france, Esperante, germane kaj fine ruse.

En granda halo kun granda sukceso pasis internacia koncerto. Ni spektis 3 dancojn far dancgrupo de lernantoj “Juneco” el la vilaĝo Otrada: tataran, ciganan, orientan; aŭskultis la kantojn en la lingvoj germana, irlandia, franca, itala. La ensemblo de rusaj muzikiloj “Sunfloretoj”, kiu partoprenis nian Festivalon la kvaran fojon (ni trovis tiujn talentuletojn dum VER-13), ĝuigis ĉeestintojn. Plezurigis la kanto de nia gasto el Kamerunio, kiu kantis pri sia amo al Rusio.

La Festivalon partoprenis ankaŭ niaj geamikoj el Ĉeboksari. Ili alvenis per buso kaj aŭto, gastis en la granda familio de Jura Karcev, vizitis prezentojn de lingvoj,



en Esperanto-salono oni prezentis “Rapeton”



en la E-klubo post la festivalo

Anton Konstantinov eĉ prezentis la finnan lingvon. Ĉiuj ĉeboksaranoj helpis al la organizantoj post la festivalo (grandan dankon, geamikoj!), teumis en la fremdlingva fakultato kaj en la E-klubo, promenis tra la urbo tage kaj nokte kaj fotis, fotis, fotis... La renkontiĝo kun niaj karaj gastoj el Ĉeĉo en neformala medio estis por ni unu el la plej agrablaj momentoj.

Nia Festivalo ricevis multajn novajn geamikojn kaj kelkajn novajn E-komencantojn. Ni esperas, ke ilia kvanto kreskos, ĉar multaj homoj diris, ke la Lingva Festivalo lasis ĉe ili bonajn impresojn. La aranĝon vizitis kelkaj ĵurnalistoj, kaj pri ĝi informis 2 lokaj TV-kanaloj kaj 4 ĵurnaloj.

Margarita Karceva (Uljanovsk)

IF – LA 25-A!

Jubileu jarfine – festu kun ni la 25-an Internacian Festivalon en Düsseldorf! IF estas novjara renkontiĝo, kiu ofertas specifan programon por la meza generacio kaj familioj (kun aŭ sen infanoj). Ĝi okazas sub profesinivela gvido, ĉiujare kun 150-200 partoprenantoj el proksimume 20 landoj.

Ĉi-jare la seminario okazos de la 27.12.2008 ĝis la 03.01.2009 en la sama klerigejo, kiu akceptis nian 24-an IF kaj montriĝas ideala seminarejo kun la nun preta novkonstruo (aŭlo, salonoj, manĝejo, Knajpo). Ĝia situo apud Rejno, la bela rigardo al la transreja urbocentro kaj la apudaj promenvojoj garantias al vi memorindajn jarfinajn tagojn.

Nia kleriga programo estas konata pro la abundaj kaj interesaj ofertoj. Nunjara kadra temo estas “Literaturo”; viaj kontribuoj estas bonvenaj ne nur pri la kadra, sed ankaŭ pri laŭdezira temo. Niaj “kadraj prelegoj” unuavice prilumu la Esperantan literaturon, sed ankaŭ memorigu pri nacilingvaj verkintoj.

Nia aranĝo estas seminario por lingve spertaj personoj, baza kono kaj uzo de Esperanto gravas. Okazos paroligaj kursoj, ekzemple por la partnero. Ni ŝatas la komencantojn, kiuj uzas la lingvon, sed malpli – la “krokodilojn”...

Pri ĉiuj demandoj vi povas skribi al Hans-Dieter Platz, Postfach 1148, DE-34303 Niedenstein, Germanio, aŭ rete al <hdp@internacia-festivalo.de>. Ĉiuj bezonataj informoj pri IF kaj reta aliĝilo troveblas ĉe <www.internacia-festivalo.de>.

Hans-Dieter Platz (Germanio)

La 2-an de majo en 2008 ĉe la retejo <<http://www.itvc.pl>> startis nova projekto: “TV-Esperanto” aŭ “Televido-Esperanto”!

Nia celo estas transdoni gravajn informojn por esperantistoj ne nur el Bjalistoko, la naskiĝurbo de la iniciatinto de la internacia lingvo, sed ankaŭ el aliaj partoj de la mondo, kie delonge la ideo de Esperanto estas konata. Ni elsendos programojn pri esperantistoj, iliaj sukcesoj, kluba agado, kongresoj, renkontoj ktp. Ni prezentos la plej interesajn libroeldonaĵojn, Esperanto-teatrojn, muzikajn ensemblojn, filmojn kaj vizitindajn lokojn. Ni esperas, ke la projekto iĝos la diskuto-forumo por esperantistoj el la tuta mondo.

Kadre de la elsendoj de “Televido-Esperanto” ni lanĉis konkurson. La konkur-sajn demandojn vi povos aŭdi en kadro de la elsendata programo. Respondojn bonvolu sendi al la redakcia adreso <esperanto@itvc.pl>.

Ni atendas ankaŭ vian personan komenton, kiun vi povas lasi en la retpaĝo de “Televido-Esperanto” sub la monitora ekrano.

Ni planas elsendi novan filmo-kompilaĵon en ĉiu dua semajno.

Bonvenon al <<http://www.itvc.pl>> por rigardi la nunan programon!

(esper-inform)

VLADIVOSTOKAJ ESPERANTISTOJ GASTIS EN ĈINIO.....

La 20-an de majo 2008 delegacio de Vladivostokaj esperantistoj revenis hejmen el Ĉinio, kie la 16-18-an de majo okazis la 5-a Esperanto-kongreso de Nordoriento de Ĉinio. Krom ĉinaj esperantistoj la kongreson partoprenis esperantistoj el Rusio, Suda Koreio kaj Kanado. Rusian grupon (26 personoj) reprezentis plejparte la aŭskultantoj de la Supera Popola Lernejo ĉe For-Orienta Ŝtata Teknika Universitato, en kiu Esperanto estas instruata lingvo por plenkreskuloj.

La kongreso okazis surbaze de Hejlongji-anga Sciencteknika Instituto (u.Ĥarbin), kie Esperanto estas instruata lingvo. La kongreso pasis en etoso de alta interkompreno kaj amikeco. Tre interesa estis kultura programo. Krome Vladivostokaj



esperantistoj konatiĝis kun la vidindaĵoj, ligitaj kun la lokoj, kie loĝis famaj rusiaj esperantistoj, pentristoj, filozofoj, inĝenieroj (ekz. Innokentij Postišev, Nikolaj Rerih, Boris Abramov, Nikolaj Kazi-Girej) dum la 30-a jaroj de la pasinta jarcento. Niaj esperantistoj same kiel la aliaj oferis monon por la viktimoj pro la terura ter-tremo en Ĉinio kaj esprimis kondolencon al ĉinaj kolegoj.

Samtempe kun la kongreso en Ĉinio en Vladivostoko okazis unua prezentado de la muzika spektaklo de la Regiona Pupteatro “Kaprica princino”, en kiu la arioj estas plenumataj en Esperanto. La teatro kune kun la Esperanto-klubo “Pacifiko” intencas surcenigi tiun spektaklon plene en Esperanto por prezenti ĝin al eksterlandaj esperantistoj. Pri tiuj du eventoj informis lokaj gazetaro kaj televido.

Aleksandr Titajev (Vladivostok)

LA 9-A LANDA KONGRESO DE MEKSIKA E-FEDERACIO

De la 1-a ĝis la 5-a de majo 2008 32 partoprenantoj el ses landoj kongresis en la meksika urbo Aguascalientes. La programo de MEF-kongreso estis riĉenhava. Estis prelegoj pri la historio de Esperanto en Meksiko, pri Esperanto ĉe la UNAM, omaĝo al komponisto kaj kantisto de infankantoj Kri Kri; la UEA-komisiito pri Ameriko Maritza Gutierrez prezentis la agadon de la Amerika Komisiono. Ĉar la intereso de MEF estas kalkuli je novaj instruistoj, okazis trejnseminario gvidita de Atilio Orellana Rojas.

Por konatiĝi kun la loka kulturo, la ĉeestantoj partoprenis ekskursojn. La unua estis duhora perbusa veturado tra la vidindaĵoj de la bela kongresurbo. La dua estis vizito al la mondfama foiro de San Marcos. Kadre de la kongreso okazis ankaŭ asembleo de MEF. Inter la decidoj faritaj estis la elekto de novaj estraranoj: Mallely Martínez Mateos – Prezidantino, Daniel Moreno Martínez – Ĝenerala Sekretario, Morayma Martínez Mateos – Kasistino, David López Rueda, Martha Cárdenas.

– Gesinjoroj, jam la trian tagon mi ne deziras labori. Kion tio povus signifi?
– Ke hodiaŭ estas merkredo.

Estis ankaŭ decido ĝisdatigi la nunan statuton kaj esplori la eblon pri la sidejo por la venonta kongreso.

Konstatinte ke ne ekzistas pruvoj pri la supozata aliĝo de MEF al la Pakto de la Esperanta Civito, la asembleo voĉdonis kaj decidis distanciĝi de tiu organizo kaj konsideri sin neniam aliĝinta.

Daniel Moreno Martínez (Meksikio)

ESPERANTO-KLUBO EN TVERJ KAJ “FENESTRO”

Nia E-klubo de Tverj sukcese vivas. Antaŭnelonge ĝi fariĝis unujara. Nun mi preparas tre interesan verkon “Aĝo de Tvera E-klubo estas unu jaro! Sperto de kluba laboro”.

Aperis nova internacia literatura revuo “Fenestro”! Mi trovas aŭtorojn per <<http://www.amikumu.com/>>. La revuo enhavas en la jam aperinta unua kajero rakontojn, eseojn kaj versaĵojn en Esperanto de aŭtoroj el diversaj landoj. La revuo disvastiĝas senpage per Interreto en formo de Word-dosiero. La dosiero havas for-

maton “broŝuro”, por ke ajna leganto povu simple printi la dosieron kiel revuon. La revuo ankaŭ havas interesajn ilustraĵojn al verkoj.

Mi – Igorj Ĥomjakov – atendas viajn rakontojn, eseojn kaj versaĵojn por estontaj kajeroj. Se vi deziras ricevi la revuon aŭ volas, ke via verko estu en la revuo, do bonvolu skribi al mi. Mia retadreso estas <ceramikisto@yandex.ru>.

Igorj Ĥomjakov (Tverj)

VsPLESk-4 – VARMA, AMATA KAJ HEJMETOSA

Jam kvaran fojon en la perlo de la urboj de Ora Ringo – la belega ĉevolga Pljos – okazis “VsPLESk”, organizita de moskvaj kaj ivanovaj esperantistoj, helpe de la kovrovanoj kaj niĵnij-novgorodanoj. Ĝin partoprenis pli ol 100 plej diversaĝaj homoj, zorge akceptitaj de Lena Kormilicina (Ivanovo), kiuj loĝis en la dometoj aŭ tendoj kaj okupiĝis nure pri ripozado laŭ la – kiel



ĉiam – riĉega kaj tre varia distra programo, lerte kompilita kaj regita de Nataŝa Nikolajeva (Moskvo). Prezenton de Esperanto por interesitoj tradicie organizis Garik Kokolija (Moskvo).

La grava specialaĵo de tiu ĉi renkontiĝo estis ke ĝi pasis monaton antaŭ la kutimaj datoj – nome, ne dum la juniaj, sed dum la majaj festoj (09-11.05), tamen la vetero la tutan periodon estis senriproĉe luksa, kio ebligis ne nur satpromenadi en la amataj belegaj ĉirkaŭaĵoj, sed ankaŭ okazigi grandegan parton de la programo subĉiele. Laŭ la opinio de multaj partoprenintoj, nia VsPLESk estas la plej ĉarma, amata kaj hejmetosa renkontiĝo tra la tuta jaro. Aliĝu, do! Ĉiam la sama urbo, la sama bazejo, la samaj datoj, la samaj organizantoj, la samaj partoprenantoj... plus vi! Bonvenon!

Irina Gonĉarova, simpla partopreninto kaj ĝuinto




 kultura revuo

rat, batalis Garibaldi, surscenigis operojn Leoncavallo kaj Mascagni, verkis dramojn Eduardo de Filippo, reĝisoris filmojn Rossellini kaj De Sica, aktoris Totò kaj Sophia Loren. Apud Napolo disfloris kaj pereis la legenda Pompejo.

La libro detale rakontas pri tio, kiel dum la 27 jarcentoj de sia ekzisto la urbo plurfoje ŝanĝis regantojn. Fondita en la 7-a jarcento a.K. de antikvaj grekoj, ĝi en diversaj historiaj periodoj apartenis al bizancanoj, normanoj, ŝvaboj, ioman tempon estis memstara regno, poste spertis francan, aŭstran, hispanan regadojn, ĝis fine en 1860 iĝis ero de la unuiĝinta Italio.

Konforme al tio estas strukturita la libro. Al ĉiu grava historia periodo respon-
das ampleksa ĉapitro kun enkonduko, dediĉita al tiuperiodaj eventoj, kaj paragra-
foj, ĉiu el kiuj priskribas iun vidindaĵon (muzeon, kastelon, katedralon, palacon ks)
ligitan kun la periodo. Apartaj ĉapitroj priskribas la nunan urbon kaj vizitindajn
ĉirkaŭaĵojn de Napolo. Fine de la gvidlibro estas utilaj informoj (adresoj, telefonoj



k.a.) por gastoj de la urbo.

La libro estas abunde ilustrita: priskribon de ĉiu vidindaĵo akompanas unu aŭ kelkaj koloraj bildoj, montrantaj ĝin ekstere aŭ/kaj interne. Sed bedaŭrinde la gvidlibro ne havas eĉ unu mapon, kun kies helpo turisto povus kompreni, kie kio situas, kaj ĝenerale orientiĝi en la urbo.

Ekstere la libro estas alloga: sur la kovrilo de verda koloro (agrabla por ĉiu fidele esperantisto), eĉ kun blankkontura stelo, estas lokitaj kelkaj ilustraĵoj – ne grandaj, sed esprimivaj.

La tekston mem mi ne epitetus fascina: ĝi estas akademie priskriba. Tio iom monotonigas la legadon, al kio kontribuas ankaŭ la maltrafa alineado: estas nek deŝovo de la komencaj linioj, nek plia interlinia spaco lime de alineoj (do, se la lasta linio de alineo hazarde havas plenan larĝon, nenio signalas komencon de la

nova alineo).

La lingva nivelo estas ĝenerale bona, se ne konsideri la nemultajn preserarojn kaj interpunkciajn fuŝetojn. Mi havas nur du rimarkojn pri gramatiko: uzon de *kun* anstataŭ *per* (“Tiuĵ ĉi artistoj plibeligis la urbon kun siaj artverkoj...”, p. 36) kaj dubindan uzon de gerundio (“Transirante al la sekcio pri Napola Topografio videblas preciozaj, antikvaj mapoj de la urbo...”, p. 91). Plurloke renkonteblas maloftaj vortoj, ĉefe arkitekturaj terminoj, sed glosaro por ili mankas. Mi rimarkis nur klarigon de la vorto *piperno* (= griza laŝtono, p. 102), post kiam la vorto estis jam kelkfoje uzita en la antaŭa teksto.

La libro krom havi certan valoron por turistoj vizitontaj Napolon, estos ankaŭ utila por interesiĝantoj pri historio kaj arto de Italio.

Viktor Aroloviĉ (Moskvo)

En REGo № 1 (44), februaro 2008 estis publikigitaj du ĉapitroj el la verkata de Andrej Grigorjevskij lernolibro en la formo de fantastaj aventuroj, surbaze de la fama verko de fratoj Strugackij “Lundo ekas sabate”. Laŭ petoj de la legantoj, al kiuj plaĉis la specimeno, ni publikigas ankoraŭ tri ĉapitrojn el la lernolibro.

Эсперанто изучается в субботу

*(по мотивам сказочной повести А. и Б. Стругацких
“Понедельник начинается в субботу”)*

Глава 5

(Краткое содержание предыдущих серий: технический сотрудник Института магии Александр Привалов принимает участие в ознакомительном занятии эсперанто – чтобы с помощью этого языка стать волшебником. На занятии его отправляют в вымышленную реальность – для лучшего освоения языка.)

Однако убежать слишком далеко ему не позволила Натали – она картинно взмахнула своей волшебной палочкой, и вся группа, включая Махорку, вдруг оказалась во всё том же конференц-зале. Хотя... присмотревшись, я заметил, что не совсем в том – все стулья были новенькие, пятна от протеканий на потолке исчезли, а паркет стал выглядеть как дворцовый. Опять иллюзия...

– Kiel vi fartas? – спросила Natali. – Как вы себя чувствуете?

– Bone, – сказал за всех Корнеев. – Отличный метод для практического освоения языка, – и грозно нахмурил брови в сторону Махорки, который пытался спрятаться под стул. Тот замер.

– Мы находимся в учебной реальности, запрограммированной на изучение эсперанто, – радостно сказала Натали. – Огромные возможности! Я обязательно буду рассказывать во Франции о российских достижениях!

– Весьма впечатляет, – сказал Еремей. – Но как насчет ...

– Магии? Сейчас. Правда, пока и магия у нас будет учебная... – Натали щелкнула пальцами и приказала: – Elefanto!

На столе появился миниатюрный слон. Живой и испуганно озирающийся.

– Kio estas ĝi? Что есть оно? – спросила Натали.

– Ĝi estas elefanto, – ответило сразу несколько голосов.

– Bone! А теперь... Elefanto, estu lampo! Будь лампой!

Слон превратился в настольную лампу.

– Kio estas ĝi? – опять спросила Натали.

– Ĝi estas lampo, – хором ответили мы.

– Bone! Lampo, estu libro! Будь книгой!

Зеленая лампа стала книгой. На её обложке красовалась надпись золотыми буквами “Libro”.

– Ĉu vi komprenas? Понимаете? А теперь попробуйте сами. Для начала щёлкните пальцами и скажите “Starto!”, чтобы войти в режим чародейства. По окончании сеанса не забудьте щелкнуть пальцами и сказать “Fino” – “ко-

нец”!

– Ĉu vi komprenas? Ni startu! Начнем!

Все учащиеся защелкали пальцами. Я тоже щелкнул искомандовал: “Starto!”. Затем я приказал: – Estu ĉevalo!

На полу передо мной появилась давешняя белая лошадь, только уменьшенного размера. Вероятно, потому что учебная модель.

– Ĝi estas ĉevalo, – сказал я. – А если так... – Ĉevalo, estu zebro! – при этом я усиленно представлял себе пешеходный переход на дороге.

Однако передо мной появилась маленькая живая зебра. Уже хорошо, а то, когда я учился волшебству по-русски, многозначность слов меня часто подводила...

В зале нарастало веселое возбуждение и команды звучали все громче: – Ĝi estas floro! Floro, estu banano! ... Tabako!!! Estu tabako!!! ... Libro! ...

Затем Натали при помощи волшебной палочки выпустила сноп искр и попросила внимания.

– В эсперанто очень много слов, которые не надо изучать, – сказала она. – Его словарь составлен из международных корней – то есть слов, которые одинаково или похоже звучат на разных европейских языках. Telefono, profesoro, projekto, ĵurnalisto, intereso, teatro, traktoro, ĉokolado, biblioteko, domo, studento, filmo. Эти слова вам понятны? Jes? Ne?

– Jes, jes... – откликнулись в зале.

– Что общего в этих словах?

– На “o” они заканчиваются! – выкрикнула синеволосая девушка из бухгалтерии.

– Правильно! Korekte!

Затем последовал рассказ о прилагательных (окончание “a”). И немного магической практики.

– Estu granda! – говорили мы, и маленькие лошадки превращались в больших. – Estu malgranda! – и они опять превращались в маленьких.

Приставка “mal-” это такая интересная штука: превращает слово в его противоположность. Granda – большой, malgranda – маленький. Bona – хороший, malbona – плохой.

Затем мы повторили наречия (окончание “e”). Очень интересно: bona – хороший, bone – хорошо, malbone – плохо. Teatro – театр, teatre – театрально.

И закончили глаголами (“as” в настоящем времени, “u” в повелительном наклонении). Mi iras – я иду. Iru – иди. Sidi – сидеть, vidi – видеть, kugi – бежать, paroli – говорить, kompreni – понимать. Ну, и значит, kugu – беги, parolu – говори...

Потренировались с фантомными лошадками. По команде “kugu” они бежали, по команде “iru” – шли.

– Ĉu vi komprenas? (ĉu – это, как я помнил из “дополнительной информации”, такой “звучащий вопросительный знак”).

– Ni komprenas!

– А теперь – Praktiko. Каждый из вас попадет в учебную реальность, где

сможете применить ваши новые знания на практике. Для каждого своя, индивидуальная, реальность. Готовы? Ĉu vi pretas? Starto!

Глава 6

(Краткое содержание предыдущих серий: Александр Привалов принимает участие в ознакомительном занятии эсперанто. На занятии его отправляют в вымышленную реальность – где необходимы те азы эсперанто, которые он уже успел изучить.)

Зал затуманился, исчезли стены, исчезли люди. Появились скалы. Я стоял на тропе, а в руках у меня был погнутый и покрытый окалиной металлический лом. А за поворотом, чуть впереди, кто-то был. Оттуда стелились клубы темного дыма и раздавались утробные взрывания. Знаем мы такие звуки... небось очень голодный дракон, которому как раз пора пообедать.

Я бросил на землю гнутый лом, повернулся и побежал по ущелью прочь от дымного поворота, постоянно оглядываясь назад. Шагов через пятьдесят, когда мою прежнюю засаду заслонил изгиб скалы, закончилось и ущелье. Точнее, здесь его разрывала огромная расселина шириной метров в пять – поперек дороги. Глубокая. Без моста.

В глубине ущелья позади меня полыхнуло пламенем, и на мгновение небо покраснело от отблесков. Затем раздался яростный рев и что-то там заскрежетало. Что-то огромное двинулось в мою сторону. Или танк, или дракон.

Я панически огляделся в поисках путей к бегству. Мое внимание привлек большой камень посреди дороги. Точнее, не сам камень – таких кругом было множество – а то, что на нем была надпись. Там было написано “ŝtono”. Так же как было написано “ĉevalo” на боку лошади и “krokodilo” на спине крокодила в предыдущих моих приключениях.

Ŝtono – это же, конечно, камень!

Starto! – выкрикнул я. – Ŝtono, estu... estu granda!

Камень послушно вырос в два раза и стал довольно большим. Что, что мне делать?!

На самом деле мне нужен гранатомет или мост. А этих слов я не знаю! Но я могу сделать этот камень таким большим, что он перегородит дорогу и даст мне время подумать!

– Estu granda! Estu granda! Estu granda!

После последней команды ущелье стало непроходимым – мой каменище уперся в обе стены ущелья так, что по ним побежали трещины.

Теперь – как перебраться? От идеи забить разлом камнями пришлось отказаться. На те камни, которые лежали на дне расселины, мои команды не действовали – наверное, было слишком далеко, а если бы я увеличивал камень на краю обрыва, то у меня не хватило бы сил его туда сбросить.

В конце концов, я сотворил из камня цветок (ŝtono, estu floro!), затем установил его на краю разлома и превратил в гиганта. Голова великана надежно легла на другой край разлома. По нему я и перелез. Аромат от него шел оду-

ряющий.

– Floro, estu malgranda! – приказал я. Мосты за собой правильнее разрушать – когда по ним может последовать какой-нибудь дракон. Хотя запах мог бы его, наверное, отпугнуть... Да и не выдержал бы цветок такого большого веса...

Погоня (или кто там еще) за созданным мною камнем продолжала шуметь, но пробиться пока не могла. А когда и если пробьется, им еще придется перебираться через разлом.

Ждать этого зрелища я не стал, а, найдя тропинку на дне ущелья, двинулся по ней дальше.

Скоро тропинка привела меня к более широкому пространству между скалами. Здесь стоял космический корабль. Как я это понял? На нем написано было “Kosma ŝipo de Roma”. А по английски корабль – “ship”. “De Roma”, вероятно, обозначало планету. Или город. Или еще что-то, пока не важно.

Перед открытым шлюзом kosma ŝipo мерцала завеса силового поля. Я храбро шагнул в нее, и – о чудо! – меня она не остановила. Но и дальше шлюза мне пройти не удалось: внешняя дверь закрылась, а внутренняя не открылась.

Раздался голос, говорящий на абсолютно непонятном языке. Даже не эсперанто. Какой-то машинный код с пересвистами. Я ответил на эсперанто, ожидая, что в правилах этой учебной реальности без этого языка никак не обойтись.

– Mi ne komprenas, – честно сказал я. – Не понимаю.

– Ĉu vi parolas en Esperanto? Saluton, – тут же сказал голос и продолжил длинной фразой, в которой я понял только “mi estas roboto-kapitano ... kosma ŝipo de Roma”.

– Jes, mi studas (изучаю) – ответил я. – Mi parolas, jes, jes! Mi parolas: “interesa filmo”, “juna studento”, “nova projekto”, “aktuala situacio”, “bona teatro”, “kolĥoza ŝoforo”, “aŭtomata programo”, “revolucia plano”, “partia kongreso”, “eleganta persono”, “projekti praktike”, “mi iras”, “vi sidas”...

– Interesa situacio, – сказал голос после некоторой паузы. – Ĉu vi estas nova studento?

– Jes, jes, nova Esperanto-studento.

– Malbona tanko, – сказал roboto-kapitano. – Ĉu vi komprenas: tanko?

– Tanko? – не понял я.

– Jes, malbona, granda tanko. Aŭtomata maŝino. La tanko iras, iras.

Я начал догадываться: – Granda tanko?

– Jes, granda, malnova, aŭtomata tanko. Idiota maŝino. Idiota programo. Ĉu vi komprenas “idiota”?

– Jes! Mi komprenas! Ĉu la tanko estas malbona (плохой)?

– Malbona. La tanko pafas.

– Mi ne komprenas “pafas”.

– “Paf-paf”, – довольно похоже изобразил голос. Делает «паф-паф», мысленно перевел я. Стреляет.

– La tanko pafas, – повторил голос.
Корпус корабля содрогнулся от мощного удара.

Глава 7

(Краткое содержание предыдущих серий: на ознакомительном занятии эсперанто Александра Привалова отправляют в вымышленную реальность – где необходимы те азы эсперанто, которые он уже успел изучить. Эта реальность оказывается не очень приятной: за ним гонятся!)

– Malbone! – с чувством сказал голос. – Koŝmaro! Katastrofo! Tragedio! Dramo! Ĉu vi komprenas “dramo”?

– Jes, mi komprenas “dramo”. Ĉu la tanko pafas – katastrofo?

– Dramo, tragedia dramo, – сказал голос. Почему, я понял через секунду.

Замигала сигнализация, и внешний люк шлюза открылся. А защитное поле кто-то отключил еще раньше. Да, это явно была катастрофа! Для меня.

– Ne! Ne! – закричал я. – Helpu! Startu!

– Tragedio... – грустно сказал голос. – Vi ne estas Roma, vi ne estas mia piloto.

В люк медленно заглянуло огромное дуло танковой пушки. Всё закопченное и рябое от частого использования.

– Eliru, – скомандовал басовитый, взрывающийся голос откуда-то снаружи.

Этого слова я не знал, но смысл был прозрачен как слеза: выходи.

Вскинув руки к небу, я осторожно выбрался из предательского kosma ŝipo и огляделся.

Дракона тут не было, зато был страшный танк незнакомой конструкции. На его башне было написано крупными белыми буквами “tanko de Saŝa”.

Пока я размышлял над смыслом этой фразы – я не был совсем уверен, но, кажется, это означало “танк Саши” – танк вдруг открыл входной люк и сыграл фанфары.

Я замер, всё так же с поднятыми руками, ожидая, что из чрева танка вылезет какой-нибудь вояка. Но никто оттуда не появился.

– Eniru, – нетерпеливо сказал танк (а стало очевидно, что взрывающийся бас исходил из него) и еще раз сыграл фанфары. Похоже, мне приказывали зайти внутрь. Или приглашали.

– Э-э-э... – нерешительно сказал я. – Kiu vi estas?

– Mi estas via persona tanko.

– Mia?!

– Jes, via persona tanko.

Goblinoj – etrangaj estaĵoj de la angla mitologio, similaj al homoj, sed malpli altaj, monstraspektaj kaj malicaj. Tre rapidaj kaj agresemaj. Kapo de G. similas tiun de ĉevalo, la okuloj estas flavaj kun vertikala pupilo, la oreloj estas longaj, la barboj – kojnoformaj. Tiuj ĉi estaĵoj posedas dentojn kaj ungegojn bestajn.

Vikipedio

La urbo Goblinsk

20.02.199..., sabato

Densa nebulo ŝvebis super matena vintra ŝoseo. La densa laktokolora nebulo estis kvazaŭ fluanta sor el la ŝoseo, ne purigita post vendreda neĝegado, el tiu blanka strio kun unu, eble du apudaj serpentospuroj de pneŭoj. La nebulo estis fluanta ankaŭ ĉiuflanken; abioj kaj pinoj, ambaŭflanke de la ŝoseo, tolerantaj pezan neĝ-tavolon sur ĉiu el siaj branĉoj, solviĝis en la nebulo, preskaŭ iĝis la nebulo mem, kaj la laktoaero ŝvebanta super la ŝoseo, eble laŭ la tuta ĝia longo, ĝis Peterburgo, estis tranĉebla per la lumo de reflektoroj apenaŭ je du metroj antaŭen.

Cetere, en tiu sabata frumateno mankis ordinara por labortagoj tranĉa reflektorvico en la nebulo. Unusola “kopeko” flava, rustflanka, aperis subite de la flankvojo vilaĝa, elektinte la direkton kontraŭan, ne al Peterburgo. Iom glitante, serpentume, ne rapide ĝi sin ektrenis al la urbeto. Du buboj, sidantaj antaŭe, la ŝoforo kaj lia kompano, estis pli sobraj ol tri fraŭlinoj malantaŭ ili. La fraŭlinoj balbutis ion, jelpetis kaj ridegis ĉiuj kune, sen bezono interkompreniĝi, simple pro ekstreme gaja humoro. Post kiam la aŭto preterveturis la ringon ĉirkaŭ milita aviadilo – monumento, kvar kilometrojn for de la urborando – iliaj ekkrioj iĝis pli kompreneblaj, ĉar ĉiuj ili krietis la samon. Ili postulis haltigi la aŭton, ili volis piseti.

- Toleru do, hundinjoj! – la bubo elgrumblis tute malĝentile eĉ sen turni la kapon. – Aŭ faru en la kalsonetojn! Baldaŭ ni venos...
- Ha-ha-ha! – ekridegis la ŝoforo. – Prave, Petruŝa, ni devas rapidi. Jen kia nebulego – la vetero ŝanĝiĝas do. Post horo la suno eble sin montros!

La fraŭlinoj silentiĝis, timigite, ĉar la ulo, kiun la ŝoforo nomis Petruŝa, eligis respondan ferocan ridegon. Ili silentis, nur jelpetante ĉe saltetoj de la “kopeko”, pli laŭte – la lastan fojon, kiam abrupta bremsado duonturnis ĝin ĉe la nomŝildo de la urbeto. Tiam ili haste eliĝis en apudŝosean neĝon kaj malaperis en la nebulo je kvin paŝoj de la aŭto.

La buboj havis alian planon. La ŝoforo per ganto forviŝis neĝon de sur la ŝildo.

- Nu! Estos granda surprizo por la gastoj de nia urbo, ĉu ne, Petruŝa? – li diris ebriete.

- Ho-ho, Stas! Ni donacos al ĝi pli belan nomon! Des pli – e-e-ekstreme taŭgan por ĉiuj porkaĉoj! – rediris Petruŝa, ŝprucante blankan farbon el baloneto sur la ŝildon.

La farbo komplete blankigis la ŝildon. La buboj lasis ĝin sekiĝi, fakte estis nur du-tri minutoj bezonataj por la acetona farbo. Tiujn minutojn la buboj uzis por malzipi la pantalonojn kaj liberiĝi de la superflua likvaĵo, elŝprucinte ĝin sur la radojn, sen atenti la revenantajn fraŭlinojn.

La fraŭlinoj, kirlante ekfulmojn de ridego kun maldecaj vortoj, nelerte enaŭtiĝis. Stas prenis el la kofrujo anticipe preparitan ŝablonon kaj ambaŭmane alpremis ĝin al la blankigita ŝildo. Petruŝa, lerte ŝprucante per alia baloneto, faris la eltranĉitajn literojn nigraj. Momenton la buboj staris, rigardante jen unu la alian, jen la ŝildon, poste ekgakis kontente kaj, saltetante en la neĝo, direktis sin al la aŭto. La “ko-peko” ekjelpis, abrupte akcelita, preskaŭ ekbaŭmis, startante en neĝglaciaj vojsulkoj, ekbruis, kvazaŭ same kontenta pro l’ ago de la mastroj, kaj malaperis en la degelanta laktaĵo nebula.

La unuaj scivolemaj sunradioj saltis sur la ŝildon post duonhoro por ekmire legi la freŝan nomon surŝilde: “**GOBLINSK**”.

23.02.199..., mardo

Maksim sidis kaŭre en duonmalluma metiejo apud sia plej sperta teamano – seruristo Kostja. Kune ili provis revivigi olepumpilon de mulda aŭtomato, sed la pumpilo, dismuntita kaj remuntita kun novaj gumaj ringetoj, tamen ne obeis ilin. Ĝi zumegis, siblis, fajfis, eĉ ululis foj-de-foje, sed ne emis plenumi sian naturan laboron – pumpi. Ambaŭ ili komprenis, ke ekfunkcio de la pumpilo post la remuntado povas okazi nur per mirakla forto – minimume tri piŝtoj el ok devus esti anstataŭigitaj je novaj. Sed ili vere atendis miraklon, ĉar la bronzajn piŝtojn por tiu rara pumpilo ne sukcesis trovi tra la tuta lando eĉ la spertulo Aleksej Ivanoviĉ.

- Do, – Maksim skrapetis la nukon. – Mi proponas refoje dismunti, poluri ĉiujn ok piŝtojn ĝis egala diametro kaj remunti. Ĉu venos aliaj proponoj?

La lasta frazo estis prunteŝtelita el iu filmo – ŝajnis al Maksim, ke ĝi foje impresigas liajn subulojn por pli fervora pensado. Sed Kostja, tridek jarojn baraktinta ĉe similaj aĵoj, restis skeptika kaj preskaŭ indiferenta.

- La propono de estro ĉiam estas metodike perfekta, – li diris kun moka rideto, – sed ĉiam tro teoria. Ni provu, tamen mi povas garantii nur bonkvalitan remuntadon, sed ne pozitivan rezulton.

Laŭ la parolstilo li vere estis laborista intelektulo, tiu Kostja. Li ŝatis elegantajn parolturnojn, kiuj ŝajnis eĉ ofendaj por inĝenieroj kun supera klero, kun diplomo enpoŝe, kaj ili senrimorse formanĝus lin, se li ne estus faranta sian seruristan laboron eĉ pli elegante ol la parolturnojn.

- Sed la polurkvaliton? – Maksim demandis riproĉe.
- Poluras ne mi, – rebatis Kostja. – Saŝka poluras. Ŝajne, hodiaŭ li estas sobra, do...

Li abrupte rompis la parolon, ĵetinte rigardon rekten, trans la dorson de Maksim. Maksim turnis la kapon – al ili proksimiĝis liphara etkreska ĉefinĝeniero de la

fabriko, Sergej. Samaĝulo, ankaŭ iama amiko, sed... sed la nova, pli alta posteno, ricevita antaŭ kvar monatoj, draste ŝanĝis la homon. Kion fari? Okazas eĉ tio...

- N-nu, Ŝumskij, – jam dum kvar monatoj Sergej alparolis ĉiujn inĝenierojn-subulojn nur per la familinomo kaj ĉiujn laboristojn – per la antaŭnomo kun patronomo. – N-nu, Ŝumskij, ĉu longe vi planas sidi tie ĉi?
- Apenaŭ, – respondis Maksim. – Ne estas senco sidi.
- Ah, senco ne estas! – flamiĝis Sergej. – Ĉu mi devas kompreni vian respondon tiel, ke la aŭtomato jam funkcias, ke mi tuj sendu tien ĉi laboristinojn, ke ni sukcesos finfari la monatan programon, ke ni ĉiuj ricevos nian salajron kaj premion? Ĉiuj, inkluzive vin!
- Lasu vi la kompatindan mekanikiston, Sergej Vadimoviĉ, – levis la okulojn Kostja, – li ne posedas magian bastoneton. La direktoro povas paroli tiel – li estas eksa gorkoma¹ funkciulo, do analfabeta pri niaj aferoj. Sed vi, inĝeniero, – vi ja ĉion komprenas!
- Sed vi, Konstantin Arkadjeviĉ, bonvolu ne diskuti! Ne vi iros al la “planumo”, sed mi kaj li, – diris Sergej, forturninte la kapon flanken. Lia vizaĝo poiomete ruĝiĝis, la lipoj faradis iajn malkongruajn movojn. – Faru vian laboron – supozeble, ankaŭ vi volas ricevi premion.
- Ne supozeble, – respondis Kostja edifone. – Ne supozeble, sed certe mi volas. Kiel ĉiu civitano, konscie kaj senriproĉe plenumanta la taskojn, komisiitajn al mi per la instrukcio por seruristo de la sesa grado, tutcerte, mi pretendas ricevi mian laŭmeritan salajron kun la premio, ne malpli laŭmerita, akurate kaj ĝisdate. Sed kio estas la ĉefa ofica devo de la ĉefinĝeniero, Sergej Vadimoviĉ? – La ĉefinĝeniero devas difini ĝustan kaŭzon de ĉiu plago kaj trovi ĝustajn rimedojn por korekti la situacion... Dume vi nek-nek...
- Oj, Kostja, Kostja... – tuj familiariĝis Sergej, kolerete svingante per la montrofinĝro. – Edukas la ĉefinĝenieron! Via lango estas via malamiko! Lu estro, malpli bonkaraktera ol mi, certe maldungus vin, pelus for de la fabriko pro tiaspecaj babiladoj...
- Sed vi provu, Sergej Vadimoviĉ, – en la voĉo de Kostja aperis grava ofendo. – Maldungu. Forpelu. Forbalau. Mi trovos laboron dignan – kaj por la lango kaj por la manoj!
- Laboru, laboru... – respondis Sergej pacige. – Sed vi, Ŝumskij, sekvu min – post dek minutoj komenciĝos la “planumo”.

Mardo estas la tago de regula ĉiusemajna kunveno de la fakestroj, nomata “planumo”. Do marde je la deka ĉiuj dek ses gravuloj de “Rusoplast” devas sidi ĉe la longa tablego en la direktora kabineto por aŭskulti akuzojn de Viĉjo, akumuliĝintajn dum la pasinta semajno. Por defendi sin – kiu kapablas tion. Sed, bedaŭrinde, – preskaŭ neniam por trovi solvon de iuj seriozaj problemoj. La solvoj aperas en pli malvasta rondo, kaj plejparte ekster tiu ĉi kabineto. Maksim skrapis sian iom platan nazon per la montrofinĝro de la maldekstra mano. Ekde lia enoficiĝo kiel

¹ Gorkomo – urba komitato de KPSU.

ĉefmekanikisto de “Rusoplast”, okazinta antaŭ kvar jaroj, lin ĉiumarde refoje mirigis kvanto de la estroj, svarmantaj en la fabriko. Jen ĉi tie sidas nur la gravuloj, li pensis. Dek ses personoj... Sed, ekzemple, Anna Antonovna, la ekonomikistino, havas tri subulinojn, sufiĉe junajn por ĝojigi festajn vesperojn de la fabrikestraro, tamen farantajn preskaŭ nenion dum la tuta labortago kaj ĉiutage. Mankas taskoj por ili, samkiel por kvar librotenistinoj – helpantoj de la ĉeflibrotenisto, estimata Andrej Miĥajloviĉ. Kasistino, inĝeniero pri “protektado de laboro”, teĥnologia buroo kvinpersona, dupersona etatfako... sume la du centojn de laboristoj direktadis kvardek tri personoj estraj. Iam, antaŭ tri jaroj Maksim riskis prezenti sian opinion al Viĉjo – amiko, malgraŭ ke direktoro. Post jara laboro en “Rusoplast” estis klare por li, ke dek kvar, maksimume dek sep kontorsidantoj kapablas tute normale prizorgi ducent laboristojn – inĝeniere, kalkule, protekte k.t.p. Sed Viĉjo – interne li koleriĝis, – Maksim vidis tiun koleron en liaj brunaj okuloj, iom ruĝigantaj ĉe kolero, – Viĉjo priridis lin. Kamarado Ŝumskij ne opiniu sin la pej saĝa, Viĉjo diris. Kamarado Ŝumskij ne scias, verŝajne, ke salajrofonduson por la estraro fiksas la gravuloj en Leningrado (en Peterburgo – Maksim enŝovis), ne gravas, estu Peterburgo, sed se la direktoro maldungos duonon de la salajratoj, la restintaj ne ricevos pli multe – Peterburgo simple forprenos tiun parton de la mono. Maksim konfesis, ke ĝuste tio ŝajnas tute stranga, ĉar la laboristoj produktos la saman, eble eĉ pli grandan kvanton de la varoj, do per la profito oni povus altigi salajrojn de la restintaj oficistoj. Viĉjo eĉ pli koleriĝis kaj foriris, dirinte, ke kun tia profano li ne plu volas trakti tiujn seriozajn temojn...

- Do, kamaradoj, kion ni havas por hodiaŭ?

La brunaj okuloj de Viĉjo trairis sinsekve ĉiun sidanton ĉe la longa tablo, haltante por fiksrigardi dum momento en vicajn okulojn. Iam ĉe kundrinko Viĉjo rakontis al Maksim, ke tiun kondukmanieron instruis al li iama unua sekretario de la gorkomo, nun, onidire, havanta tre altan postenon ie eksterlande, ĉe la partia mono. “La fiksrigardo, – Viĉjo diris, – eĉ se pormomenta, – iom timigas la rigardaton, minimume – streĉas por ke li serĉu en la kapo ian sian kulpon”. “Sed se la rigardato estas senkulpa?..” – Maksim demandis, ne formovante la okulojn de la streĉrigardo de Viĉjo. “Ne ekzistas senkulpaj subuloj, – Viĉjo respondis, formovante la siajn. – Almenaŭ la estro devas forte enkapigi tion, por ke la subuloj timetu”...

La direktoro ĉiam trarigardadis la okulojn nur de la sidantoj ĉetable. Tie, dekstraflanke de la direktoro, sidis Sergej, la ĉefinĝeniero; la estro de la vendofako – rufhara, ruzokula Eŭgeĉjo; la financuloj – Anna Antonovna kaj Andrej Miĥajloviĉ; la preskaŭemerita Nina Dmitrievna, prizorganta etataferojn; Aleksej Ivanoviĉ – ho, sendube! De maldekstre ĉetablis sulkvizaĝa saĝulo Valentin Iljiĉ – la ĉefprojektiŝto; ĉiamgaja Nadinjo, “protektanta laboron”; viglega kaj trompema Anton Daniloviĉ, la estro de la muldometiejo; ne malpli vigla, ofte tusanta pro tri jardekoj apud acetono, Lidia Petrovna, kiu estris la celulojdan metiejon; samaĝulo de Maksim, simpatia Saĉjo Kirzov, la estro de la kontrolo fako; kaj Alevtina, mamriĉa dudek ses jarojn aĝa respondeculino pri SKE.

La tutan muron maldekstre de la tablo okupis kvin vastaj fenestroj. Ilin plene kovris blanka aĵura punto, malavare produktita de vintraj frostegoj, sed vazistasoj de

du fenestroj estis ovritaj – tie videblis kvadratetoj de blanketa ĉielo kaj ventoŝirataj rufnigraj fumobuloj, eligataj amase el la tubo de la kaldronejo. Maksim povis observi ĉion ĉi, ĉar li estis sidanta ĉe la kontraŭa muro. Tie la kvar seĝojn, al kiuj la direktoro ne ofte jetis sian rigardon, ordinare okupis teknikistoj. Apud Maksim sidis la ĉefelektristo Lazar, la kalva garaĝestro Stepan Anatoljeviĉ kaj la estro de la provizora konstruista fako, malalta, korvohara turkmeno Kolja. La vera nomo de la lasta estis Amminigalej Berdimuĥammedoviĉ, sed tiun konis ne multaj, ĉar mem la posedanto de tiu nomo insiste petis nomi lin Kolja.

- Do, kamaradoj, kion ni havas por hodiaŭ? – ripetis Viĉjo, kies rigardo fine rondiris la tablon kaj la duan fojon venis al la okuloj de Anna Antonovna.
- Viktor Vasiljeviĉ, por la fino de la dua dekada de la monato februaro ĉio moviĝas konforme al la programo, – knarvoĉe ekmitralis la ekonomikistino, ŝovinte sian iom tro longan nazon en grandegan notlibron, – siteloj – sesdek du procentoj, sapujoj – okdek, kombiloj diversaj, sume – sepdek ok, kraĵoj ne estas planitaj por februaro, tuboj....
- Stop! – Viĉjo haltigis ŝin, klinante la kapon al siaj paperoj. – Mi pardonpetas, Anna Antonovna, sed ni iom deĉifru jen tion ĉi: la kombilojn diversajn – sepdek ok procentoj. Ĉu vi aŭ iu alia el inter la kamaradoj scias, ke la fako de nia estimata kamarado Kirzov preskaŭ kvaronon de tiu kvanto resendis al la metiejo, kiel fuŝfabrikaĵon?
- Mi ne scias... – elknaris Anna Antonovna sen levi la okulojn.
- Certe, vi ne scias, – reeĥis Sergej. – De kie vi sciu, se vi ricevas viajn ciferetojn de la metiejo, sed ne de la varstokejo?
- Kia stultaĵo! – Viĉjo montris ekmiron. – Ĉu de longe?
- Fakte... fakte ĉiam, – la vangojn de Anna Antonovna kovris ruĝaj makuloj. – Dum dudek ses jaroj ekzistas tia ordo.
- Stultaĵo kaj refoje stultaĵo! – la direktoro ĵetadis koleraĵajn rigardojn al la ĉetablanoj. – Do la tuta via kajero estas trompa! Kaj neniuj konas la veron!
- Mi konas, Viktor Vasiljeviĉ, – serveme diris Eŭgeĉjo.
- S-s-sciulo nia! – elsiblis Aleksej Ivanoviĉ. – S-sukceson vi havas ĉe “Kio? Kie? Kiam?”¹...
- Ha, siblu, siblu – ĝis veneno ekgutos... Uzendas por kuraco! – repagis Eŭgeĉjo senprokraste.
- Ja jes, ci ĝin bezonas! – Aleksej Ivanoviĉ faris sian pafon. – Eble helpos vin por ke la edzino ne iradu maldekstren!
- Ci silentu, – elraŭkis Viĉjo al Aleksej Ivanoviĉ, kaj tuj al Eŭgeĉjo, – ci parolu!
- Ne necesas longe paroli, – Eŭgeĉjo diris intence malrapide kaj faris paŭzon. – Eble li mem klarigu?..

Li montris perokule al Aleksej Ivanoviĉ.

- Sed... sed kun via permeso, Viktor Vasiljeviĉ, ni aĉetis... – diris tiu akurate, strebante neniom vekti ofendon de la direktoro.

¹ Populara televida ludo.

- Kion do ni aĉetis? – Viĉjo elparolis minactone.
- Polistirolon... ne tre bonkvalitan, de dua kategorio... Por kombiloj devus esti taŭga, sed... aerbobeletoj aperas ene dum muldo...
- Mi konfirmas, – intervenis Saĉjo Kirzov, – aerbobeletoj. Kaj pro tio la dentoj forfalas mem post la unua tuŝo, eĉ antaŭ kombado. Se mi akceptos tion – la vendejoj ja resendos nepre ĉion. Kaj postulos rekompenco.

La vizaĝo de Viĉjo iĝis punca, la lipharetoj leviĝis minace. Li ambaŭmane apogis sin ĉe la tablo, duonleviĝis kaj ekkriis:

- Vi! Vi! Vi! Ĉiuj kulpas!..

Tio ĉi estis elkriita super la kapojn, eble al la murhorloĝo, pendanta kontraŭe. Kelkmomente la direktoro restis duonstaranta kaj punce ŝvelinta pro kolero, poste la punco iom degelis, kaj li sidiĝis en sian brakseĝon.

- Ni volas, ke kombumaj ... kombantaj... kombaj kvalitoj de niaj kombiloj atingu mondan komban, kombuman nivelon! – li ekmentoris. – Sed por tio ni bezonas nur polistirolon de la unua kategorio...
- Endas enskribi por ne forgesi... – flustris la garaĝestro, malfermante la notlibreton. – Pri kombaj-kombumaj nivelo.

Stepan Anatoljeviĉ estis arda kolektanto de ridindaĵoj-stultaĵoj, eldirataj dum la planumoj; lia fidela multjara notlibreto estis konata al ĉiuj, ĉar dum kundrinkoj li fojfoje prezentadis la “perlojn”, registritajn tie. Viĉjo, ne ofte rigardanta al la teknikista muro, tamen flankrigarde fiksas la skribadon.

- Skribas ci..., – li diris. – Nu, skribu, venos via vico... Sed pri la kombiloj... Kamarado Kirzov, mi tamen petas! Viaj knabinoj bonvolu rekontroli ĉion. Eble ili tro forte tuŝis... eble certan kvanton ni tamen vendu... Alia afero: per kio ni savu la planon? Mi ĉiujn demandas! Per kio ni savu nian premion?!
- Do eblas iom pli da siteloj enplanigi, – proponas knaris Anna Antonovna. – Ili bone vendiĝas antaŭ la ĝardensezono. Ŝajne, ni havas iom da superflua polietileno...
- Jes, – Viĉjo tuj kaptis la proponon. – Siteloj! Ni komisiu al kelkaj laboristoj noktan muldadon per du niaj grandaj aŭtomatoj porsitelaj! Ni iom alpagu al tiuj sindonaj homoj!
- Homoj estas, Viktor Vasiljeviĉ, – inside komencis Anton Daniloviĉ, – kaj perlabori iom pli ili ne rifuzas, certe, sed... mi havas nur unu funkciantan aŭtomaton por hodiaŭ.
- Kion ci diras?! – Viĉjo denove furioziĝis. – Kial unu?!
- La mekanikisto klarigos, – tuj diris Sergej.
- Ŝumskij! – Viĉjo turnis la kapon al la teknikista muro kaj ĵetis fulman rigardon al Maksim.
- Antaŭ du semajnoj mi raportis pri la pumpilo, – diris Maksim. – Mankas rezervaj piŝtoj. Pasintmarde mi denove raportis, sed la piŝtoj mankas ĝis nun. Certe, ni provos ion priŝamani – eble ni funkciigos la aŭtomaton por kelkaj tagoj. Sed egale necesas ŝanĝi la piŝtojn al la novaj.
- Priŝamani? – Viĉjo demandis. – Do kial ci sidas ĉi tie? Iru, ŝamanu,

vuduu, sorĉu, kiel vi volas, sed la aŭtomato devas ekfunkcii... horon mi donas al vi! Aliokaze... mi ne scias! Aleksej Ivanoviĉ, kion pri piŝtoj?

- Nu-u... bronzo estas deficitita en la lando, – komencis Aleksej Ivanoviĉ, – d-do bronzaĵoj piŝtoj ankaŭ ne tiom facile troveblas...
- Trovu malfacile, – la direktoro haltigis lin. – Vi ricevas vian salajron ĝuste pro viaj trovkapabloj. Mi donas al vi du semajnojn. Nun ni finu la planumon kaj ek al laboro!
- Kijel do tiel ni finu?! – subite ekprotestis Kolja, kiun neniu aŭdis ĝis nun. – Kijel ni finu, se mi havas promblemojn?! Cemento manka, briko manka – manka ĉion por ni konstrui! Kvadrato – ruĝo vulpa, ne laboras!
- Silentu ĉi! – Aleksej Ivanoviĉ mansvingis, kvazaŭ forpelante tedan muŝon. – Pasintsemajne vi ricevis kvincent kilogramojn...
- Dek sakoj cemento?! Por duono tago labori, Aleksej! Ŝajtan! – Kolja leviĝis kaj faris du paŝojn al Aleksej Ivanoviĉ.
- Koljasidiĝutuj! – Viĉjo ekkriis, dum Aleksej Ivanoviĉ timigite sin protektis per paperujo. – Restu por kelkaj minutoj! Ankaŭ vi, Kvadrato, restu – ni priparolos la aferon triope.

Tiumomente la pordo ovriĝis abrupte kaj la kabineton enkuris la sekretariino Irinjo. Timigita, kun iom taŭzita hararo, singulte spiranta, ŝi haltis ĉe la pordo.

- Kio okazis, Irina Borisovna? – Viĉjo imitis oficialecon.
- Okazis... Viktor Vasiljeviĉ! Okazis... Ĉeremisov venis...

El la sekretariejo antaŭkabineta aŭdiĝis ia bruo, kvazaŭ renversiĝis seĝo kune kun sidanto.

- Venu pli proksimen, – Viĉjo ordonis. – Restu Baritonov kaj Ŝumskij. Ceteraj iru al siaj laborlokoj.
- Sed kijel mi? Cemento? Briko? – ekprotestis Kolja.
- Venu kun Kvadrato post dek minutoj. Sed nun eliru kaj fermu la pordon. Ambaŭ pordojn. Ha, mi forgesis tute, hodiaŭ, okaze de la tradicia vira festo niaj virinoj decidis gratuli la defendantojn de la Patrujo. La kunveno okazos en SKE je la dek sepa tridek. Ne forgesu. Ĝis revido al ĉiuj.

Irinjo sidiĝis apud Maksim. Ŝia spiro iom post iom trankviliĝis.

- Parolu! – Viĉjo diris, strabante al ili kaj samtempe al la pordo.
- Do, unue, telefonis Konstantin, la seruristo, – elspiris Irinjo, – li petis diri al Maksim... Matvejeviĉ, ke la aŭtomato estas funkciigita...
- Bravulo! – Maksim komentis. – Jen do viaj siteloj, Viktor Vasiljeviĉ.
- ... Poste eniris Ĉeremisov... ebria!
- Ĉu vi ne kutimiĝis? – demandis Sergej. – Li neniam venas sobra.
- Mi... mi scias, sed nun... nun li tuj kaptis min ĉi tie... – Irinjo montris la bluzon, ŝveligatan per elokventaj mamoj. – Li volis kisi... Mi forturniĝis. Li ŝovas al mi kvindek rublojn! Iru ni en la apudan ĉambron, li diras, mi... mi soifas virinon! Ajla odoraĉo! Ia samogono! Mi batis lin... per io kaj forkuris tien ĉi.

Maksim ruĝiĝis.

- Vi ne bone batis, Irinjo, – li diris. – Mi iru por kompletigi la aferon. Ah,

- kanajlego! Alkoholo jam ne plu sufiĉas por li – virinon li soifas!
- Stop! – diris Viĉjo. – Restu ĉi tie. Ĉeremisov, kiel inspektoro, estas dume utila por ni. Ne tuŝu lin. Sergej, iru al li, ĉar sen helpo li ne sukcesos leviĝi de sur la planko. Prenu lin en vian kabineton... vi tie havas alkoholon, – jes, mi scias. Donu al li sufiĉe, por ke li ekdormu. Sed intertempe li subskribu la kontrolfoliojn... Poste Seniĉkin veturigu lin hejmen.
 - Ne sufiĉos mia alkoholo, – Sergej diris necerte. – Nur kvarcent gramoj restis...
 - Pura! Naŭdek tri gradoj! Ĉu ne sufiĉos? – Viĉjo miris.
 - Nu, eble sufiĉos... – Sergej respondis. – Ni vidu...
 - Jes! Jes! – intervenis Maksim. – Drinkigu lin, amiĉoj, drinkigu! Por ke li ne forgesu la vojon tien ĉi! Kiom longe tio daŭros?! Muzelon lian mi draŝu nur unu fojon – kaj li ne plu orgojlos ĉi tie! Jen vidu – ploras via sekretariino...
 - Ĉe-esu... – Viĉjo etendis la vorton. – Nu, draŝu vi la muzelon – li ne plu venos. Sed venos alia, sobra inspektoro! Kiu neniokaze subskribos la kontrolfoliojn pri niaj kaldronaĉoj. Kion do la uzino faru sen varmo, mi demandas vin?
 - Sed ŝi? – Maksim tuŝis la harojn de Irinjo.
 - Estu via afero trankviligi ŝin, – Viĉjo jam ridetis. – Mi ne dubas, ke vi sukcesos.



Mikaelo Bronŝtejn dum EsPrimo-5